

UKRAINA STELO

GAZETO de UKRAINAJ ESPERANTISTOJ

n-ro 4 2016



Gajan Kristnaskon! Feliĉan Novjaron!

KIEN PLUEN? LA XXII-a KONGRESO de UKrEA OKAZIS

paĝo 4

**ESPERANTO-FILOKARTIO
DE "UKRAINA STELO"**

paĝo 28



Vasil BOBINSKIJ EN NOVA HIPOSTAZO

paĝo 32

UKRAINA STELO

gazeto de ukrainaj esperantistoj
fondita de Oresto Kuzma en 1913
n-ro 4, 2016

ENHAVO

MOVADO

La XXII-a UkrEA kongreso okazis.
Kien pluen?..... 3

JUBILEOJ

La 110-a datreveno de la naskiĝo
de Ivan Bahrjanij..... 7
La 125-a datreveno de la naskiĝo
de Jurij Klen 17

HISTORIO DE LA E-MOVADO EN UKRAINIO

Fruaj esperantigoj de verkoj
de Ivan Franko..... 19
„Ukraina Stelo“: la unua ilustristo
Ivan Kosinin kaj simboloj
de la unua kovrilpaĝo..... 23
Esperanta filokartio
de „Ukraina Stelo“..... 28
Vasil Bobinskij en nova hipostazo..... 32
Aldonaĵo al la historio
de Ukrainia E-movado..... 34

NIA KALEJDOSKOPO..... 35

LINGVOKONSULTEJO..... 36

NIAJ FESTOJ

Kie loĝas la Sankta Nikolao?..... 37

NIAJ PASIOJ

La skikurado..... 38

Redaktoro: Volodimir Pacjurko
Arta redaktoro: Niko Voloŝin

La poŝta adreso de la redakcio:
„Ukraina Stelo“, p.k. 26,
Lucko-18, UA-43018, Ukrainio

La retadreso:
ukrainastelo@gmail.com

Ĉion por „Ukraina Stelo“ sendu
laŭ ĝia retadreso.

La papera versio de la gazeto
mendebblas ĉe Niko Voloŝin
laŭ la retadreso:
niko_helianto@yahoo.com

Ni ne pagas honorariojn.
Pri la enhavo de la kontribuoj
responsas la aŭtoroj mem.
La redakcio ne ĉiam dividas
la opiniojn de la aŭtoroj.
Ĝi lasas al si la rajton mallongigi
materialojn.

Monoferoj por malgrandigi la
prezon de la papera gazetversio
aŭ fari ĝin nula por ne pagipovaj
personoj bonvenas:
Приватбанк, картка
5168 7555 2831 2453,
Волошин Микола
Володимирович



*En fabela nokt' novjara
 Al legantoj niaj karaj
 Kun esper' kaj pac-aspiro
 Flugu varmaj bondeziroj:
 Estu sanaj kaj feliĉaj,
 Je humoro gaja riĉaj!
 Ĉiupaŝe, en aferoj
 Akompanu vin prospero,
 Suno, ĝojo, bono, belo!
 Via „Ukraina Stelo“*

movado

LA XXII-a KONGRESO de UKREĀ OKAZIS. KIEN PLUEN?

(Kelkaj postkongresaj pensoj)

Por ĉiulanda Esperanto-asocio vica kongreso ĉiam estas grava evento: ĝi sumigas diverskampajn atingojn, analizas mankojn kaj erarojn, skizas planojn por estonteco. En apartaj landoj ĝi transformiĝas en veran esperantistan feston.

Bedaŭrinde, nialandaj kongresoj neniam estis tiaj. Ĉiam nur en Kijivo, ĉiam kun malmultnombra partoprenantaro kaj preskaŭ ĉiam kun megalomaniaj kvereloj. Kompreneble, ke la nuna situacio en Ukrainio ne permesas fari la kongreson modela. Sed se ĝi estas eĉ kun minimuma kvanto da ĉeestantoj, ĝi estu grava aranĝo por kunigi nian esperantistan areton, plani realajn alirojn por plifortigi nialandan E-movadon, disvastigi la internacian lingvon kaj ĝiajn ideojn, plikreskigi nian verdan familion.

Preparante la ĉi-jaran kongreson – jam la dudekduan laŭvice – ĝia organiza komitato (KOK), kiun estris Mikaelo Lineckij, penis konsideri ĉiujn ĉi realaĵojn kaj fari la nunan kongreson multe pli grava por disvolviĝo de nialanda E-movado. La ideo okazigi la

movado



kongreson en Lvivo evidentiĝis ne realigebla. Unue, pro tio, ke ĝi aperis tro malfrue, due – ke la loka E-klubo ne estis preta ĝin subteni kaj praktike kunlabori kun KOK. Do restis la malnova varianto – okazigi la kongreson en la ĉefurbo.

La ĉi-jara kongreso havis sian specifon. Estis necese prepari ŝanĝojn en la statuto de UkrEA, kiuj, laŭ la postuloj de juraŭtoritatoj ebligus pluan ekzistadon de la asocio kiel neprofitdona organizaĵo, kaj la ŝanĝojn, kiuj permesus pli efektive okazigi venontajn kongresojn, plibonigi laboron interne de la organizaĵo. Malgraŭ la antaŭkongresaj alvokoj al esperantistoj de p. Serhij Prudko, kiu respondecis pri la statutoŝanĝoj, proponi ŝanĝojn kaj diskuti ilin, preskaŭ neniu reeĥis, do li mem proponis plimulton da ili.

Ĝis la lasta tago al la posteno de la asociprezidanto kandidatiĝis du personoj: la ĝisnuna vic-prezidanto M. Lineckij, kaj la dua – Andreo Jankovskij. La unua anticipe prezentis sian programon, la dua – nur siajn sloganojn: forigi el UkrEA „uzurpintojn“ kaj okazigi en Ukrainio Universalan kongreson de Esperanto. Matene antaŭ la kongreso al tiu duopo aliĝis ankaŭ Eŭheno Kovtonjuk. Tuj post la komenco de la kongreso s-ro Lineckij rezignis sian kandidatiĝon.

La kongreson partoprenis pli ol 30 personoj. Neniuj alilandaj gastoj venis. La tagordo de la kongreso kaj ĝia iro estis kutima. En la unua tago okazis malfermo de la kongreso, paroloj de la kongresdelegitoj, en la dua – raporto de la prezidanto de UkrEA E. Kovtonjuk, ĝia diskutado. Plue devus sekvi la raporto de la komisionestroj, sed tio ne okazis. Estro de la kontrol-revizia komisiono J. Matvijiŝin ne partoprenis la kongreson pro malsano kaj ne transdonis skriban raporton, kiun li devus fari por prezenti ĝin al la kongreso. Plimulto da riproĉoj koncernis ĝuste tiun ĉi komisionon. La



dua tago de la kongreso estis dediĉita ankaŭ al konfirmo de la nova versio de UkrEA-statuto kaj elektoj de la gvidantaro de la Asocio.

La kongreso aprobis ŝanĝojn en la Statuto de UkrEA kaj decidis komisii al UkrEA-prezidio korekti ilin, se aperos iuj pretendoj flanke de la jurorganoj.

Per la sekreta voĉdonado E. Kovtonjuk estis elektita prezidanto de Ukrainia Esperanto-asocio. Estis elektita ankaŭ prezidio de la Asocio, kiun eniris E. Kovtonjuk, N. Voloŝin, V. Jaskovec, O. Rohalskij, V. Pajuk, I. Glagolevskij, S. Ŝmatkov. Samtage okazis ankaŭ la konferenco de Ukraina filio de ILEI.

Aŭskultante la raporton de la prezidanto kaj parolojn de partoprenantoj, oni ne povis ne rimarki, ke en nialanda E-komunumo ankoraŭ brulas fajreto de entuziasmo, deziro ion fari, ke de tempo al tempo okazas io nova, interesa: jen kreo de E-centro en lucka universitato, jen eldono de la esperantigita kolekto de poemoj de T. Ŝevĉenko, jen sukcesaj Oresto Kuzma-tagoj aŭ sinprezentoj en UKoj en Lillo aŭ Nitro, jen traduko kaj aperigo de la libro „Krimo estas nia“. Sed ne eblas ne rimarki, ke al ĉio ĉi, al tuta nia laboro mankas sistemo, mankas strategio. Lige kun tio mi volus turni min al vi:

Meritaj kaj ordinara kolegoj! Ĉesigu viajn ridindajn vortoduelojn, ne ridindigu kaj ne kompromitu antaŭ la socio nialandan E-movadeton. Ne faru elefanton el formiko, priskribante vian „atingojn“ kaj „sukcesojn“ sur la verda kampo! Ni estas malfortaj, disigitaj kaj mallaboremaj!!! Karaj verduloj! Se vi vere amas Esperanton kaj volas dediĉi al ĝi vian volon, pasion, talenton, la tutan vin – estu je la kapo pli altaj de rutinaj

movado

kvereletoj, de orgojluloj kaj ŝajnegantoj! Memoru, ke UkrEA estas nur **ŝildo**, kaj ke la vera forto estas nur ĉiuj ni kune. Memoru, ke nia asocio ne estas propraĵo de Kovtonjuk aŭ de iu alia prezidanto, kiu surprenas sur sin tiun pezon! La sukcesa agado de la landa asocio dependas de ĉiu el ni, de niaj etaj, abelaj kontribuoj, diligente portataj al la komuna abelujo. Veteranoj! Penu kompreni niajn junajn geesperantistojn! Ĉiuj ili estas normalaj, saĝaj homoj, pretaj pluporti la bruligitan de ni torĉon. Sed ni devas ĝustatempe helpi niajn gejunulojn per siaj bondeziraj konsiloj. Ili, iliaj iniciatemo kaj verve estas garantio de nia, mi kredas, pli hela estonteco.

Kaj fine pri eventuala UK en Ukrainio. Jes, la ideo inviti ĝin estas tute akceptebla. Sed ĉu sukcesos ĝi en nuna situacio en nia lando kaj pleje – en la situacio de nia Asocio? Ĉu ni preparis por tio nian socion kaj niajn aŭtoritatojn? Ĉu en niaj librovendejoj interesitoj povas trovi lernolibrojn de Esperanto, vortarojn? Ĉu en lokaj E-kluboĵ oni povas lerni la internacian lingvon? Ĉu ni havas almenaŭ iujn kontaktojn kun profesiaj muzik-, kant- kaj danckolektivoj, kiuj povus senpage prezenti sian majstrecon en la Nacia arta vespero? La liston de tiuj „ĉu“ eblas daŭrigi. Sed se ni sukcesos pozitive respondi almenaŭ tiujn ĉi demandojn, ni rajtos nin turni kun respektiva peto al Universala Esperanto Asocio. Kaj mi certas, ke ĝi estos aŭdita.

Niko VOLOŜIN, Lucko



La Prezidio de UkrEA:

Jevhen KOVTONJUK – prezidanto de Ukraina Esperanto-Asocio, strategia planado, organiza laboro, rilato al eksteraj esperantaj kaj neesperantaj organizaĵoj.

Ihor GLAGOLEVSKIJ – junulara agado, renkontiĝoj, turismo.

Viktor JASKOVEC – ordigado de la kunlaboro de ĉiuj financaj funkciuloj en UkrEA (librotenisto, kasisto, KRK kaj la Prezidio, inkluzive libervolan monoferan fonduson de UkrEA), kuratoro de projekto “Ukraina Esperantista Memorlibro”.

Viktor PAJUK – eksterlandaj membroj de UkrEA, kunlaboro kun alilandaj E-asocioj, komisionoj, dissendolisto de UkrEA, sekretario de la Prezidio.

Oleh ROHALSKIJ – paĝaro de UkrEA, modernaj komunikiloj, priservo komputila.

Serhij ŜMATKOV – regiona agado, UkrEA-membraro, Jarlibro de UkrEA.

Niko VOLOŜIN – eldonaj aferoj, libroservo, redaktado kaj eldonado de “Helianto”.

Kontrol-revizia komisiono (KRK)

Olga Graĵdan (estro), tel. 9865730350, e-mail: 70.07.911@mail.ru.

Viktor Konevskiĥ, tel. 0973078402, e-mail: torktor@mail.ru.

Volodimir Lucenko, tel. 0974946281, e-mail: lucenko33@ukr.net.

La kasisto Irina Krajevskja, e-mail: irina.krayevskaya@gmail.com (dume ne e-parolanta), tel. 0979667611.

IVAN BHRJANIJ



Ivan Bahrjanij (ukr. Іван Багрянний, vera nomo Ivan Lozovjahin) naskiĝis la 2-an de oktobro 1906 en la urbo Oĥtirka de Ĥarkova gubernio en la familio de masonisto. Studis en Kijiva Arta instituto (fakultato pri pentroarto).

En aprilo 1932 estis arestita en Ĥarkovo kaj akuzita pri „kontraŭrevolucia agitado“ per siaj verkoj. Post 11-monata restado en unuopula kamero estis ekzilita al Verda Kojno (Fora Oriento). En la jaro 1936 Bahrjanij fuĝis, dum du jaroj sin kaŝis ĉe siaj konatoj kaj kuraĝis alveturi hejmen, en Ukrainion, kie post kvar tagoj oni arestis lin. Denove estis malliberejo, kie la verkisto pasigis 2 jarojn kaj kvar monatojn, el ili – 83 tagojn en la kamero de mortkondamnitaj. La akuzakton pri sia kulpeco Bahrjanij ne subskribis. En aŭtuno 1940 estis liberigita pro „nesufiĉeso de materialoj“.

Lia sano komencis ruiniĝi – progresis tuberkulozo.

Baldaŭ post la alveno de la germanaj okupantoj al Oĥtirka la verkisto transloĝiĝis Galicion, de kie en 1945 elmigris Germanion. En 1948 fondis Ukrainan revoluci-demokratian partion, dum 17 jaroj redaktis la gazeton „Ukrajinski visti“ („Ukrainaj novaĵoj“). Mortis la 25-an de aŭgusto 1963 en la urbo Nova Ulmo, kie estas enterigita.

La plej famaj verkoj de Bahrjanij estas la romanoj „La tigrokaptistoj“ (1944) kaj „Getsemane“ (1950), bazitaj je aŭtobiografiaj faktoj. Por ili al la verkisto en 1992 estis aljuĝita postmorte la Ŝevĉenko-premio – la plej prestiĝa ukraina ŝtata premio. En 1963 la ŝikaga filio de la Unuiĝo de Demokrata Ukraina Junularo komenciis akcion pri aljuĝo de la Nobel-premio al Ivan Bahrjanij, sed lia subita morto malhelpis la oficialan kandidatigon.

La temoj de la verkaro de Bahrjanij:

- senmaskigo de la sistemo de la bolŝevisma teroro;
- monro de kruelaj kaj insidaj metodoj de la funkciado de la punorganoj;
- senmitigo de la bolŝevisma sistemo de mastrumado kaj malbona traktado de homoj;
- rakontado pri suferoj de la ukraina popolo en la bolŝevisma „paradizo“;
- senkompromisa kaj argumentita senmaskigo de la rusa imperiisma ŝovinismo;
- sinturno al la historio kaj batalo kontraŭ Rusio;
- prezento de la sorto de la ukraina homo en la vortico de la Dua mondmilito;
- kredo je venko de bono super malbono.



(Fragmentoj)

Parto I

[La heroo de la romano Andreo Ĉumak, fuĝinta el punlabor-loko, estis remalliberigita. Oni metis lin en la kameron, destinitan por unu malliberulo, sed en ĝi jam estis 27. Preskaŭ ĉiuj estis false akuzitaj. Inter ili estis profesoroj, scienculoj, iamaj altpostenuloj, eĉ sacerdoto...].

Ĉapitro VII

...Kalkulo de la tagoj [pasigitaj de Andreo en la kamero – V. P.] perdiĝis, kiel perdiĝis ankaŭ klaraj limoj inter la tagopartoj, inter vespero kaj nokto, inter mateno kaj tago. – estis nur tempoparto, kiam intensive oni vokas al pridemandado kaj kiam ne vokas; la tempoparto, kiam oni devas laŭ la komando dormi, sed neniu dormas, kaj la tempoparto, kiam dormi estas malpermesite, sed ĉiuj dormetas, ne povante venki dormon. La tempoparto, kiam homoj nur kuŝas, kaj la tempoparto, kiam nur sidas. Kaj por la limoj servas – inter nokto kaj mateno – „povjerka“ [ruse: apelo – V. P.], inter mateno kaj tago – tagmanĝo, inter tago kaj vespero – vespermanĝo, kaj inter vespero kaj nokto – la komando „Dormi!“; bruoj de rigliloj, malforta tremado en la genuoj kaj motormuĝo ekster la muroj, intermitata de suspektindaj eksplodoj.

Kaj super ĉio ĉi estas sigelo de krianta absurdo, perplekseco, malespero kaj plena frenezigo. La homoj, ĵetitaj en la terurabismojn, en la inferon de malhonorado kaj mezepoka inkvizicio sen ajna sia kulpo, – la homoj, kiuj pasis tra fajro kaj akvo, aŭ la homoj, kiuj atingis la pintojn de sciigo, pintojn de maksimuma ekflugo de la homa spirito kaj penso – luktis temerare per la animoj en la malklara maro de absurdo kaj nenion komprenis. Volis kompreni ĉion kaj ne povis. Volis klarigi ĉion kaj ne scipovis. Kaj batadis super ĉio, kiel noktpapilio en sorĉa rondo, rompante tranĉrandon de la penso. Ĉio ŝajnis absolute simpla kaj komprenebla kaj samtempe ĉio estis absolute absurda kaj ne komprenebla. Kaj ne kongruis kun iuj kadroj de la nocioj pri honoro, moralo, etiko, klasa kaj homa solidareco, laŭceleco, kulturo, civilizacio... Ĉiuj ĉi nocioj ŝajnis absolute superflujaj, stultaj, spekulaj. Kaj entute ĉion ĉi, la tutan travivatan kaj observatan epepeon, kies

grandiozecon ĉiu konis, des pli sentis sur si mem, ĉiu komprenis kaj klarigis malsame.

Serĉante logikecon en mallogikaĵo, sencecon en sensecaĵo, sistemon en kaoso diris: unuj – ke tio estas grandioza kampanjo por purigo de la ariero disde la disidenta kaj danĝera soci-politika elemento antaŭ eventuala milito, kaj grandiozece de la kampanjo karakterizas sin per grandiozece de la lando mem kun la 200-miliona loĝantaro, kie estas minimume 199,5 milionoj da malkontentuloj, malamikoj de la popolo; aliaj – ke tio estas la kampanjo de homrekonstruo, kie estas rompnda ĉio, kio pensis alie ol la Politika Buroo de CK TKP(b)¹, ekstermda ĉio, kio ne samopiniis kun la ĝenerela linio de kelkaj homoj el la komunisma gvidantaro; la triaj: ke la ŝipo turnas dekstren kaj tio estas stalina Termidoro². Dirante tiel, oni menciis ekstermadon de ne nur senpartiuoj, sed ankaŭ de la tuta malnova partigvardio – de ĉiuj, kiuj ankoraŭ havis ideon en la koro, kaj dum la revolucio ĉi ideon firmigis per sia sango kaj sukcesigis ĝin; la kvaraj – ke tio estas restaŭrado de la Rusa imperio, kaj por ke ĝin fari, necesas rompi ĉion, kio povas rezisti, precipe en la naciaj respublikoj; la kvinaj – ke ĉiuj ĉi klarigoj estas ĝustaj, kaj ke ili sume estas ĝusta senco de tio, kio okazas.

Se temis pri la metodoj, do evidentigis, ke ĉi tie, kiel nenie, kun plej nudigita cini-keco kaj brutala konsekvenco estis aplikita la slogano „La celo pravigas la rimedojn“, kaj la dialektika veraĵo „La ekzistado determinas la konscion“ estas modernigita kaj akomodita al la filozofio, mondrigardo kaj moralo de la nuntempaj inkvizitoroj kaj nun ĝi sonas „La batado determinas la kulpokonfesion“. Sed la substituon de unu dialektika veraĵo per la sama dua dialektika veraĵo oni faris ruslingve, kaj en tiu ĉi lingvo ĝi sonas ideale plastike kaj elokvente: estis – «Бытие определяет сознание» [ruse: „La ekzistado determinas la konscion“ – V. P.] kaj fariĝis «Бытие определяет сознание» [ruse: „La batado determinas la konscion“ – V. P.]. Imagu al vi, oni ŝanĝis nur unu-ununuran literon, sed kiel genie tiu perifrasto spegulis la epokon kaj ĝian modernan filozofion kaj internan esencon. «Бытие». Tio signifas b a t a d o. En ĉio. Senindulga, totala, seninterrompa batado. Areto da fanatikaj, kaj duonalfabetaj, kaj senprincipaj reformantoj dresas 200 milionojn. Kaj, dresante kaj serĉante la moralan apogon, ili kompletigis la tezon pri „batado“ per la tezo, kiu fariĝis testamento de reartikigistoj: „Pli bone rompi la ripojn al cent senkulpuloj, ol preteratenti unu kulpulon“! Kaj ĉi testamento iĝis la epokdevizo.

Pro tio, ke tiu „unu kulpulo“ reale estas tiu, kiu tenas en la manoj la stirilon de la potenco, la ripoj de ĉiuj 200 milionoj trafis en danĝeron. Jen pro tio tiel krevas absolute ĉiuj prizonoj pro tropleniĝo, kaj jen pro tio la unuopula kamero entenas preskaŭ t r i d e k homoj, kaj jen pro tio tiel haste oni konstruas multe da novaj prizonoj, kaj, fine, – jen kial tiel bruegas tutajn noktojn la aŭtomotoro kun surdigilo...

Parto II Ĉapitro IV

[...Sacerdoto Petrovskij rakontas al sia najbaro-samkamerano Kuliniĉ biblian historion pri la perfido kontraŭ Kristo en Getsimane. Andreo atente aŭskultas. En la fino de la rakonto li alparolas la sacerdoton].

– Patro... Mi ne kredas je Dio... Sed... rakontu al mi ankoraŭ, rakontu al mi pri Getsemane...

Kaj dentopreminte la lipon, rigardante al la plafono, ekster la plafonon, en iun neko-

¹ CK TKP(b) – Centra Komitato de Tutrusia Komunisma Partio (de bolŝevikoj).

² Termidoro – la dekunua monato de la franca revolucia kalendaro, uzita ĉi tie figure – neniigo de la revolucio kaj ĝiaj atingoj per la manoj de la revoluciistoj mem.

jubileoj

natan foron, Andreo aŭskultis pri Judaso, pensis pri siaj fratoj, kaj en mallumo, kiu kovris la vidadon, li viziis la malluman, plenan de nigra, sufoka tropika obskuro ĝardenon, tristan silenton kaj la siluetojn de mirtoj kaj kiparisoj... Kristo staras sur la genuoj kun la okuloj, direktitaj en la abismon de la sufoka nokto... Antaŭsento de la antaŭmorta animturmento... Perfido... Apostateco de Petro kaj fremdeco de la postdorm-aspektaj disĉiploj... Soleco... Senlimeco de malĝojo, neeltenebla pezo de malespero... Kaj demalproksima krio de la koko – aŭguranto de malkonfeso kaj aŭguranto de la proksima turmento, malhonorado kaj morto... La malbonaŭgura kokokrio... La krio de malespero... Triumfo de malbono...

– Per „ĉo!“..

– Ĉumak...

– Pretiĝu al pridemandado!

La legendo pri Getsemane ŝiriĝis. La antaŭsvenon de la tropika nokto anstataŭigis la antaŭsveno en la ŝvelintaj artikoj kaj ostodoloro. Petrovskij rigardis per la malĝojplenaj okuloj, kaj Oĥrimenko [la familinomo de la samkamerano – V. P.] estis haste bandaĝanta la ŝultrojn de Andreo per malseka viŝtuko. Sed Andreo dejetis la viŝtukon, ridetis pale al malgaja Goliato [la kromnomo de Oĥrimenko – V. P.]: „Ne estas bezonate“. Alrampis Litvinov [la familinomo de la samkamerano – V. P.]. Profesoro Litvinov arde flustris pri tio, ke li kompatu sin, ja tutegale nenio rezultos el tio, ke ĉiuj, pro kiuj li tiel suferas, jam, verŝajne, delonge lin perfidis, ke por gardi sian juŝnecon kaj vivon li fendiĝu³... Nu, oni kondamnos lin al kvin jaroj de malliberigo, sed estos pli bone ricevi kvin jarojn kaj elvivi, ol pere i dispremita pro nenio, por nenio... Litvinov flustris arde, tremante kaj plenigante sincere la vortojn per tuta sia animo... „Gardu vin... Gardu vin... Fendiĝu“.

Andreo suspiris profunde kaj deflankigis lin per la mano... La krio de la damnita koko staris en la oreloj, postulante perfidon, – la perfidon kontraŭ ĉio kaj si mem... Tiel do doloris ostoj kaj svenis animo pro la morala kaj fizika turmento. Estu tiel...

Andreo vestis siajn ŝuojn nudpiede kaj foriris.

Denove al pridemandado.

Li iris nun sur la grandan ĉenstablon.

Li restis en la kamero nur kelkajn horojn, kvazaŭ speciale nur por elaŭskulti konfeson de Petrovskij kaj eksenti suferojn de la granda animo de tiu nuntempa martiro...

Petrovskij profunde suspiris kaj levinte la okulojn ien trans la prizonan kradon, nerimarkeble, tre mallaŭte movis la lipojn, per nura spiro flustris;

– Sinjoro! Preterpasu ĉiujn kaj lin tiu kaliko de absurdo!..

Sed tion aŭdis neniu.

Ĉapitro V

Ĉiu scias, kio estas ĉenstablo. Tio estas atingiĝo de la moderna tekniko por amase fari maŝinojn, ŝuojn, vestojn. Ĝi estas bazo de seninterrompa produktadprocezo, kie pecon post peco, ŝraŭbeton post ŝraŭbeto estas muntataj la produktataj aĵoj aŭ maŝinoj, efektivigante pli rapide intencojn de la konstru-krea homa genio. Tio estas la ĉenstablo de la sistemo de Henry Ford.

Sed neniu scias, kio estas la ĉenstablo de la sistemo de Nikolaj Jeĵov⁴ – la ĉenstablo,

³ fendiĝi – en la prizona ĵargono: konfesi sian kulpon.

⁴ Jeĵov Nikolaj – la popola komisaro de enlandaj aferoj en USSR dum 1936-1938 jj., periodo, kiam stalinaj reprezalioj atingis maksimuman intensivecon.

sur kiu pecon post peco, ŝraŭbeton post ŝraŭbeto ne estas muntataj, sed malmuntataj homaj animoj. Neniu ĝin konas, neniu scias, kio ĝi estas, krom tiuj, kiuj sur ĝi jam estis. Ankaŭ ĝi estas la ĉenstablo de la seninterrompa produktado kaj ankaŭ de norma produktado – produktado de senvolaj estaĵoj, la ĉenstablo de la seninterrompa procezo de senpersonigo de la homo, disfendo de lia psiko, malmuntado de la homa animo, transformado de la homo en nenion, en la truan de kringo.

Ĝi estas la procezo de seninterrompaj turmentoj, kiu daŭras kelkajn tagojn, kun partopreno de vico da enketistoj kaj batmajstroj, farantaj laŭvice sian laboron super la sama homo, aplikante sinsekve ĉiujn metodojn de la fizika kaj morala influo. Ĝi estas la procezo, kiu pasas sub la plej moderna slogano de la plej moderna dialektiko – „La bataĉo determinas la konscion!“ „Konscio“ plejparte ne eltenas tiun procezon kaj anstataŭ malmuntita je ŝraŭbetoj animo restas malpleno, kiu nomiĝas frenezeco, aŭ plena prost-racio kaj falo.

Estas la malgranda ĉenstablo kaj ankaŭ la granda ĉenstablo. Kutime la malgranda ĉenstablo tute sufiĉas por malmunti ĝis fino la animon de ordinara homo. Sed estas ankaŭ homoj, kiuj eliras de sur ĉi ĉenstablo kvankam jam preskaŭ transformitaj fizike en ĉifonon, sed ilia animo ĉiam restas ne malmuntita, tiam oni metas ilin sur la grandan ĉenstablon. La granda ĉenstablo estas destino de la neordinare obstinaj kaj malobeemaj, fortaj spirite homoj.

Andreo iris al la granda ĉenstablo. Kaj tio, kio antaŭis ĝin, estis por li nur malgranda ĉenstablo.

Komenciĝis por Andreo la vivperiodo, kiun eblas nomi per neniu nomo, por kiu eblas elekti neniun titolon. „Koŝmaro?“ – tiu rusa vorto estas belega, sed malforta. Deliro? Infero? – sed la biblia infero ekzistis nur teorie, ĉiuj tion scias, nur malsincere ŝajnigas, ke kredas ĝin, kaj la vorto mem pro konstanta uzado kaj sen demonstra kaj reala ekkono de la esenco de tio, kion ĝi kovras, eluzuĝis kvazaŭ kupra groŝo kaj fariĝis ordinara prozismo, filistra tintilo. Kaj la infero mem, precipe en „Eneado“ de Kotlarevskij⁵, estas sufiĉe simpatia kaj gaja. Teruro? Diabla diboĉo? Roma inkvizicio? Ne, ĉio ĉi estas malforta kaj nekapabla enhavi en si tion, kio okazas kun la homo, kiu spertis tian vivperiodon. Eĉ kune prenitaj ĉiuj ĉi difinoj estas malfortaj.

La granda ĉenstablo! – jen estas tiu ununura difino.

Kaj la konduton de la homo – de la ĝisfreneze obstina homo, – metitan sur la grandan ĉenstablon, ankaŭ eblas nomi per neniu vorto.

Heroeco? Kio estas heroeco? Heroeco estas majesto, poezio, beleco. Heroeco estas subita, majesta, kapturna por aliuuloj ago, ĝi estas brilo de subita kuraĝo, kiu kaptas la homajn korojn per realigo de io neebla. Ĝi estas mallongdaŭra streĉo por atingi en-konscian efekton kaj poste ĝi estos pligrandigita kaj irizita de la homa fantazio. Heroeco estas agopatoso antaŭ la vizaĝo de la mondo kaj antaŭ la vizaĝo de preparitaj laŭroj, glori-paroloj, floroj, oraj medaloj kaj de virina aŭ junulina amo, metata sur la altaron al herooj kiel plej valora donaco, kaj kiu, eble, sola movigas tiujn heroojn, detenante ilin en la plej grava momento de la transformiĝo en ordinaran timulon kaj senvalorulon. La heroo fermas la okulojn kaj tenante en ili ĉiujn logojn, kiel turka soldato paradizajn huriojn, nudajn kaj cedemajn, furioze deziratajn, kaj sin ĵetas per la kapo malsupren en malklaran akvon – se elnaĝos, li subite fariĝos la heroo por la tuta vivo kaj konsumanto de bonoj, destinitaj por la heroo; se dronos – ankaŭ tiam li estos la heroo, ĉar la mondo

⁵ Kotlarevskij Ivan (1769-1838) – ukraina poeto, kiu travestiis ukrainlingve „Eneadon“ de Vergilio.

jubileoj

aplaŭdos lin kaj starigos monumenton kaj bonoj de la tero estos same garantitaj al li ankaŭ en la transa mondo. Sed kiel tio koncernas la nuntempan homon sur la granda ĉenstablo, kaŝe disprematan en hermetike izolitaj ŝtossakoj, la homon, kiu rampas kaj kurbiĝas kiel vermo, solisola, sen la mondo kaj laŭrokronoj, demonstre metitaj de observantoj? La homo, kiu luktas ne por mirigi la mondon, kiu por li ne ekzistas, kiel ankaŭ li, kiu ne ekzistas por la mondo (ho, kio estas homo inter 200 milionoj, des pli inter du miliardoj! Sablero!), sed por konservi sian malgrandan mion de la morala malgloro kaj malhonoro antaŭ si mem, kontraŭ morto, antaŭ kiu ordinara morto de herooj estas granda, neatingebla feliĉo. Kaj kiel tio koncernas heroecon?

Ne, tio ne estas heroeco. Tio absolute ne estas heroeco. Ĝi estas io tia, kio ne havas nomon en la homa lingvo.

Plurajn tagojn kaj noktojn (li ne scias, kiom da tiuj tagoj kaj noktoj estis!) daŭris por Andreo tiu senpaŭza inkubsonĝo. Preninte lin post la rakonto de Petrovskij por pride-mandado, oni tenis lin la tutan tempon supre kaj nur malofte forkondukis lin malsupren en kelon por unu horo por ripozigi lin, kaj poste denove reprenis lin sur la ĉenstablono. Li laŭvice pasis tra ĉiuj ŝtupoj de malmuntado de la animo, al li laŭvice estis aplikitaj ĉiuj metodoj, kiujn kapablis elpensi la diabla epok-genio. Li sidis denove sur la pinto de la seĝo. Poste li sidis sur la obuso, kien oni sidigis lin tiel, kiel antaŭlonge oni sidigis zaporogojn sur palisojn... Oni kondukis lin al pafmortigo, enscenigante ĝin.. Oni kraĉis al li sur la vizaĝon... Batmarkis sur la femuroj „bifstekojn“, kio en la lingvo de batmajstroj nomiĝis „fari ĉimpanzon“... Oni batis lin per feraj bastonoj... Enketistoj kaj plenumoficistoj pasis antaŭ li per senfina aro, kaj li eĉ ne sciis, kiu kiel nomiĝas, nur rekonis ilin laŭ la grado de krueleco kaj genieco en la satana eltrovemo de rafinitaj torturoj. Li ne konis ilajn nomojn kaj eĉ ne memoris bone iliajn vizaĝojn. Kiel ne memoris ankaŭ multajn metodojn, aplikatajn al li en la momentoj de senkonsciigo. Kaj ankaŭ nome tion, kion li memoris!.. Tamen kion povas diri tio al la mondo, al eksteruloj?! Oni ne povas priskribi tion per la vortoj, tio ne estas komprenebla por feliĉaj homoj, kiujn preteriris tiu ĉi pokalo, tion oni ne povas konscii ĝisfunde. Tion necesas travivi! Ĉiuj koloroj palas, kaj ĉiuj vortoj mizeras, eluzitaj de la homoj, kiel kaŭĉukaj galoŝoj. Jen, por ekzemplo, fera bastono... Kiel eblas priskribi feran bastonon en la manoj de iu Velikin? Nenocan, iom rustan, senvaloran bastonon! Aŭ nedanĝeran anguleton de seĝo!.. Kvar centimetrojn granda, tia malgranda trianguleto. Kiu lernis geometrion, tiu povas bone imagi ĝian desegnaĵon – ĝi estas simetria triangulo, kie du akraj anguloj egalas al unu rekta, kaj la ortanto mallevita el la rekta angulo sur la bazon de la triangulo egalas kvar centimetrojn. Surbaze de tio eblas ĝuste kalkuli la tutan malgrandecon de la trianguleto, kion egalas la anguletoj ĉe ĝia bazo kaj kion egalas ĝiaj lateroj. Sed neniu povas kalkuli, se la homo estas sidigita sur ĝin je kokcigo! Kiom da fizika turmento! Kaj kiom da morala turmento! Tion ne povos kalkuli eĉ ĉiuj profesoroj de geometrio el la tuta mondo, kunigitaj kune. Tio entute ne estas kalkulebla. Kiel ne eblas kalkuli lukton de la homa animo inter la plej simpla savmaniero – kapitulaci kaj la plej peza – ne kapitulaci.

Aŭ jen ordinara obuso!.. Ĝi staras en la angulo kvazaŭ ornamo. Ĝi estis iam farita por pafi, sed oni senigis ĝin de obusingo, kie estis metita la flugforto, krome el ĝi mem estis elprenita eksplodkerno, deŝraŭbita ekflamigilo kaj ĉio cetera eksplodebla, – ĝi estis senigita je la funkcio destinita al ĝi de la inventista genio kaj metita jen ĉi tie en la angulo. Kvazaŭ sentaŭgaĵo. Kvazaŭ sentaŭgaĵo sen ajna funkcio... Ho ve! La nova genio destinis al ĝi novan funkcion de neniu kaj neniam, de neniu ĝinĝenieroj, konstruistoj,

artileristoj kaj de neniu alia antaŭviditan. Ĝi estas la funkcio de la terura ilo por rekonstruado de la homa animo. Peco de la ĉenstablo... Kiam oni sidigas homon sur la obuson, li freneze revas, kiel pri Dia favoro, pri subita eksplodo de la obuso, pri detonacio... Ho se li havus tiun bonegan eksplodanimon!

Sed ankaŭ la obuso estas nenio kontraŭ tio, kiam iu en la brila nova uniformo en la muroj de la ŝtata purgatorio, en la templo de la proleta justico komencas urini sur la vizaĝon de la etendita, sendefenda, tamen ĉiam fiero – nerompebla fiero – homo. En liajn okulojn mem!..

Sed ĉio ĉi tamen estas nenio kontraŭ la homo, kontraŭ lia fiero, furioza obstineco, kiu ekscitata per kruela malamo, malespero kaj senforta kolero poiome atingas manian staton. Ĝi estas obstineco de la fieraj ĝis sinforĝeso homoj, de la senigitaj je ajnaj defendorimedoj, kiuj kun malicigo, sadismo rilate al si mem kontraŭstarigas al ĉio sian frenezan, blindan, senliman malestimon. Nu kion ankoraŭ povas kontraŭstarigi la fiero kaj dispremita fizike homo?! Nur obstinecon kaj deziron malhonori siajn turmentantojn por ĝisnule senvalorigi ilian diablan laboron kaj per tio kraĉi al ili en la vizaĝon. Ĉi obstineco fariĝas fiksideo.

Andreo fariĝis jam kiel ombro kaj neniu el la amikoj ne povus rekoni lin. Eĉ propra patrino. Al li, iam tiel forta, jam tremis ekstremaj, kvazaŭ ĉe paralizulo, kaj ĉiam turniĝis la kapo pro laceco kaj anemio. Li fariĝis jam eĉ ne neŭrasteniulo, li fariĝis histeriulo kaj nur per freneza volostreĉo ankoraŭ iel-tiel regis sin. Ne, ne per streĉo. Lin tenis kaj instigis lian volon abismo da malamo, kiu progresie kreskis kaj kun ĝi progresie kreskis obstineco. Ĝi pligrandiĝis inversproporcie al fizika leĝo. Tio estis jam histeria, blinda, freneza obstineco. Se oni demandus Andreon, por kio konkrete estas tiu obstineco, – li ne povus logike respondi. La obstineco. Furioza, nekonscia, ne plu logika, sed flagranta. La lasta rifuĝejo de lia animo. De lia fiero, ŝirita, soleca, jam tute soleca animo. Sed ne rompita. La pensoj pri sinmortigo, kiuj insiste aperis en plej pezaj momentoj de la psika senfortiĝo cedis al la furioza venkodeziro. Venki! Kriplule, duonkadavre, sed venki! Ĉi tie li metis sur karton sian koron, sian animon, kiu dum la tuta vivo estis ne fleksita kaj devas venki... Tiujn ĉi krudulojn, tiun ĉi fiularon, tiujn ĉi bestojn li devas venki! Devas... Ja ne eblas, ke fieco kaj malnobleco superu lin, lian animon, lian fieracon... Ne eblas! Tio eblas neniam! Neniam!.. Neniam!..

Ne unufoje en la momentoj de plej granda malespero, uzante la okazon, ke fojfoje oni kondukis lin tra koridoro, li estis ekregata per subita blinda impeto – sovaĝe ekkriegi kaj klininte la kapon sin jeti laŭlonge de la koridoro kaj elane frakasi la kapon kontraŭ la kontraŭa muro, ke la infera fajro kaj lia tormento disprucu sur la muroj... Sed li detenadis sin surlime, sur la lasta limo, kie staris kvazaŭ kolono de fajro tiu „neniam“!

Aĥ, kio estas heroeco! Kio estas la glorigata dum jarcentoj heroeco de kavaliroj kaj kruckavaliroj, kaj armeestroj, kaj Susanin-oj⁶, kaj Zaliznjak-oj⁷.. Poezio! Ĝi estas belega poezio. Revita, alloga, dezirinda. Poezio. Nur poezio.

⁶ Susanin Ivan – rusa nacia heroo, vilaĝestro, kiu dum la pola-moskva milito en la jaro 1619 estis petita konduki polan-litovan taĉmenton al la vilaĝo, kie rifuĝis la caro Miĥail Romanov. Per sia bofilo Susanin avertis la caron pri la minacanta lin danĝero kaj kondukis la taĉmenton en mala direkto, en la arbardensejon, kie la taĉmentanoj komprenis la trompon kaj sabro mortigis Susaninon.

⁷ Zaliznjak Maksim – ukraina nacia heroo, kozakestro, gvidanto de la ribelinta ukraina vilaĝanaro (hajdamakoj) kontraŭ polaj feŭduloj en la jaroj 1768-1769. La ribelo nomiĝis Kolijivŝĉina (de la vorto „kolij“, kiu signifas ribelulon armitan per forkego, falĉilo aŭ per akrapinta paliso).

jubileoj

Andreo, kiel ĉiu en tiu ĉi malliberejo de la socialisma lando, estis senigita je iuj ajn, plej simplaj kaj ĉie ekzistantaj defendrimedoj. Eĉ en la plej teruraj kazematoj de la plej famaj reakciaj regnoj malliberuloj tamen havis defendrimedojn – apelaciojn, advokataron, publikan opinion, kaj fine la malsatstrikon. Ho ve. Ĉio ĉi estas ridinda, eĉ la penso mem uzi tiujn rimedojn estas ridinda: ili ĉi tie ne ekzistas. Por la homo, trafinta ĉi tien, forestas defendo. Li estas sablero, forstrekita ankoraŭ vivanta el la registro kaj metita absolute ekster leĝon. Absolute. La sola rimedo restas, ŝajne, la malsatstriko, ĉar tio, ŝajne, dependas de la volo de la malfeliĉulo mem, de la malliberulo mem. Ŝajne, Andreo provis uzi ĉi rimedon, anoncinte la malsatstrikon. Sed baldaŭ – tre baldaŭ – rezignis. Evidentiĝis, ke ankaŭ la malsatstriko kiel defendrimedo ĉi tie ne ekzistas. La malliberulon oni simple nutras per klisterilo, injektante en la stomakon fiŝoleon aŭ iun alian likvon, por ke la homo ne povu morti pro malsato. Tiel oni nutras unuopulojn, tiel ankaŭ la tutan kameron, kiam la malsatstriko estis anoncita organizite. En la lasta okazo oni ankoraŭ komencas proceson pro la o r g a n i z i t a rezisto al la organoj de la revolucia justico.

Tial ankaŭ tiu ĉi sola defendrimedo, tiel glorigita en la historio de ĉiuj prizonoj, ĉi tie ne validis.

Andreo rezignis tiun ĉi defendrimedon kaj malrapide estingiĝadis.

La ĉenstablo komencis misfunkcii. Tro malmola evidentiĝis la nukso, kaj enketistoj ne planis tiel rapide, dum unu etapo dispremi sian viktimon ĝismorte. Ili komencis fari paŭzojn kaj forkonduki Andreon en la kameron. Vere, por baldaŭ preni lin denove, tamen ili ebligis al li fizike ripozeti, kvankam morale tio estis la sama nervozigo.

En la kamero oni sciis nenion detale pri tio, kio okazas al Andreo. Li mem rakontis nenion. Silentis. Homoj nur vidis liajn batbluaĵojn, liajn malsanece inflamantajn okulojn, teruran, ĉiam pli grandan konsumiĝon fizikan kaj nervan, vidis, ke li fandiĝas, kiel vakso, de tago al tago, de horo al horo kaj ili rigardis lin angore. Kaj ankaŭ silentis. Nur ĉiufoje, kiam Andreo estis vokata al pridemandado, la okuloj de ĉiu dilatiĝis pro teruro, akompanante sian kamaradon, pli ĝuste lian ombron. Kiam li estis revenanta – 29 okulparoj renkontadis lin per muta demando. Andreo nenion diris kaj kuŝiĝadis sur sian lokon, foje spasme plorsuspirinte, sen plendo kaj sen larmoj. Provosoj ne devigis lin leviĝi kaj li povis kuŝi, rompante la prizonan disciplinon, rigardante per febra vido plafonon aŭ fenestron, trans la kradon, ien foren, tien, kien ne povas normale atingi la homa okulo.

Arboj kreskis malantaŭ la fenestro, malantaŭ la krado, ie post fera ŝirmilo. La malliberuloj ilin ne vidis, sed sciis, ke ili tie estas, ke ili tie kreskas. Dum la noktoj, kiam la fenestro estis duonfermita, kaj en la kamero regis prema silento, kiam dormo forkuradis de sur la palpebroj, kaj la homoj nur ŝajnis, ke ili dormas, kuŝante kun la fermitaj okuloj kaj atendante elvokon, – de malantaŭ de la fera ŝirmilo alflugadis mallaŭta susuro, tiel konata kaj tiel forgesita susuro de arbfoliaro. Ili staris jen ĉi tie apude, trans la muro. Tie estis maljunega kastaneo kaj tremolo – la tremanta tremolo. Facila nokta venteto, ŝtelpenetrante en mornan kvarangulon de timigaj blokoj de ie el stepoj, de ie el vastaj spacoj, de domoj kaj kortoj, de patrinoj kaj fratinoj, de kverkarbaroj kaj arbaretoj, mallaŭte susuris en la pintokronoj de la solecaj arboj, izolitaj de la mondo kaj ankaŭ enprizonigitaj. Ĝi ion rakontis al ili, ĝi kaŝe pri io ilin demandis, demandadis, mallaŭte, por ke ne aŭdu gardistaro kaj ne punu la arbojn, ne forhaku.

La sopirinta pri la ventsusuro arestintorelo klare diferencigis, kiel susuras grandfolia

kastaneo kaj kiel tremas malgaja tremolo... La tremolo estas la arbo de funebro. La arbo, sur kiu pendumis sin Judaso... La legendo pri la tremanta tremolo, pri la atestinto de lasta suspiro de la malfeliĉa Kristo-disĉiplo, Judaso Iskariota, kvazaŭ fluis trans la krandon kun la foliarsuro, estis rememorata eĉ ne de unu, kvazaŭ la tremolo trans la muro kriis pri tio en la animojn de arestintoj... Kaj por unuj tio estis la susuro de konsolo, por aliaj – maltrankviliga avertokrio... Rememorata estis ĉi legendo ankaŭ de Andreo, rememorata estis ankaŭ la tremolo, kiu kreskis, verŝajne, en Getsimane.

Folietoj trans la krado verŝajne balanciĝas sur la maldikaj petioletoj (jen tiele ili balanciĝas!): akriĝinta imago reflektas ĝis plej etaj detaloj, kiel staras tie trans la muro kastaneo kaj tremolo, kiel venas al ili vento de foraj spacoj, kiel balanciĝas folietoj sur maldikaj petioletoj, kiel ili timeme babilas, flustras unu al la alia ion misteran, interfrapas sin, interplektiĝas... Folietoj... Malgrandaj... De unu flanko glaceaj, brilverdaj, de la alia malbrilaj, kovritaj de delikata griza lanugeto. Kaj sur la kastaneo – grandaj, majstre eltranĉitaj, rande dentaj, kvinpintaj, kvazaŭ disstarigitaj fingroj de la mano. Sed ial la kastanefolioj ne kortuŝas, eble pro tio, ke pri ili ne ekzistas legendo: la koron tuŝas malĝoja bruo de la tremolo, kaj tremo de ĝiaj folietoj ŝirmas ĉion, disfluas per la maro – maro da folioj, alkoĉitaj per maldikaj tigejoj kapon malsupren... Kaj super ili staras la legendo...

Kaj ankaŭ la vento kortuŝas – imagata kaj aŭdata nur pro la ventobruo. Ĝi venis ĉi tien. De kie li venis en tiun ĉi korton? Jen ĝi flugas tra vastaĵoj, jen ĝi tuŝas la herbon ĉe la vojetoj, kie iradis iam la piedoj de Andreo, jen ĝi flugas super ilia domo, jen ĝi tuŝas grandan foliaron de la acero, kiun li kun la patro plantis iam apud stalo... Vento... Li ne alportis kun si la aromon de herboj, ne alportis la najtingalan triladon, ridon de junulinoj, infanan voĉbrulon, pepadon de hirundoj super ilia ĥato, suspiron de la patrino – ĝi sukcesis alporti nenion, sed ĝi ĉion ĉi aŭdis kaj ĉion ĉi portis kun si... Sed eblas, ke alportis? Kaj rakontas tie? La vento... Ĝi balancas la kastaneon kaj la tremolon trans la muro kaj konfidas al ili tion, kion subrigardis, kaj tion, kion subaŭskultis, – espereble tiuj, trans la muro, eliros promeni... Pro tiu ĉi penso ankaŭ la kastaneo kortuŝas. Jen ĝi staras tie – larĝbranĉa kaj malrekta, nigraŝela maljunega kastaneo – kaj aĥas mallauĉe, svingante la branĉobrakojn, kvazaŭ deziras frapi per la brakoj sur la baskon, aŭdinte ion en la maltrankvila flustro de la vento. Andreo imagas ĝin kaj lia koro pleniĝas de rememoroj... Ne, ankaŭ la kastaneo havas sian legendon. Belegan, ravan legendon...

La suna Kijivo kaj la Ŝevĉenko-bulvardo... Altkreskaj kastaneoj staras per senfina kordono kaj tenas en la suno mirindajn kandelojn – la kandelojn de siaj floroj. La kastaneoj kvazaŭ grandaj preĝejlustraj, parade dismetitaj sur la strato, enigitaj en nigran, malsekigitan per maja pluvo teron. Ili staras kaj triumfe incensas al la ĉielo oran polvon, aromojn, pompan floradpatoson, kaj sur la folioj kaj sur la florkandeloj trembrilas pluveroj, diamantoj de gutoj, elradiante ĉielarkojn... Kaj sur la strato iras, dancetas, ridegas juneco. Ilia juneco, lia juneco – tra Kijivo, tra la ĉefurbo de lia lando, tra la Ŝevĉenko-bulvardo, – sentrista, kuraĝa, fiera, enamiĝinta juneco! Kaj la vojon al ĝi prilumas la lumo de la fantastaj, verderozaj lustraj... Kastaneoj... Ili ja staris ankaŭ en la parko de lia naskiĝurbo – atestintoj de lia infaneco, lia juneco, atestintoj de lia amo, revoj, suspiroj en la majaj noktoj, juliaj vesperoj... Etendinte la branĉojn per densaj laŭboj, ili gardis lian feliĉon, lian sekreton, lian ĝojon, ardan boladon de lia juneco. Kaj ili silentis kiel konspirintoj, kaj kiel konspirintoj petole bruis per la branĉoj renkonte, altirante la ĉielon, mallongigante la vojon al ĝi... Kastaneoj...

Kaj jen kvazaŭ ilia sendito staras trans la muro.

jubileoj

Kiam nokte pluvas, tiam trans la fenestro oni aŭdas apartan bruon – pluvo falas sur la arbojn kaj al la arestintorelo ŝajnas, ke iu ludas harpon. – pluvo batas sur foligrupoj, frapas sur diversaj surfacoj, starigitaj sub diversaj anguloj, sur la folioj grandaj kaj malgrandaj, kaj ĉion ĉi diferencigas la akreaŭda orelo de la arestinto. Kaj la vento iradas kaj turnas branĉojn, la branĉoj knaras, branĉeto frapas sur branĉeton, faligas sekaĵon, kiu krevas kaj flugas malsupren, tuŝante la foliojn: unu, du, pli malsupre – tintigas folietojn de sube malsupren, foje flugas teren. Kaj kiam pluvo ĉesas, kaj kun ĝi kvietiĝas la vento – ankoraŭ longe gutas diverstonaj sonoj, – la gutoj deŝiriĝas kaj falas de sur folio sur folion, de sur folio sur folion – unu, du, tri, kvar... La arboj! La tuta mondo! La tuta granda ĝardeno, kvankam estas nur duopo de ili... Ili flustras per la foliaro trans la muro kaj ili flustras en la animo...

Foje, kvazaŭ sendito de ili, la kameron enflugas nokta papilio, aŭ du, aŭ eĉ tuta brigado. Ili flugas ĉirkaŭ veziko de la lampo en plafono, sin batas kontraŭ ĝi per la kapo, rondflugas freneze, en blinda malespero, batadas temerare, subite trafinte en la tragikan rondon, en la neantaŭviditan plagon, kaj jam ne povas forŝiri sin. Tiel, kvazaŭ oni trafas sur la grandan ĉenstablون, en la kaptilon de tiuj ĉi muroj, kaj jam ne povas forŝiri sin. Batadas kontraŭ lumo, batadas jam histerie, rompante la vidadon, kaj sian volon, kaj sian animon, – kaj pereas. Falas mortaj. Ili ne povas jam elflugi, ne povas reveni kaj rakonti ion pri tio, kion ili kaŝrigardis. Multaj okulparoj observas ilin silente, senvorte, kaj ĉiun tiu ĉi vidaĵo, verŝajne, malĝojigas, kiel Andreon, elvokante malagrablajn asociojn, pezajn asociojn...

Foje tra la ŝirmilo enflugas folieto, deŝirita de la vento kaj eble intence kaŝe enĵetita. La folieto ŝtelfalas, kvazaŭ enĵetita de iu el libera mondo sekreta skribaĵo. La folieto el la libera mondo! Tio fariĝas evento! La folieto el la libera mondo! La verda folieto el la libera mondo... Nenio skribita estas sur ĝi... Ho ne, sur ĝi estas multo skribita, sed necesas scii ĉion ĉi tralegi!.. Sur ĝi estas skribita eksterordinara poemo, kiu skuas la animon, – la poemo pri suno, vento, libero, vivo... kaj la poemo pri perfido... se tiu folio estas tremola.

La folieto cirkulas el manoj en manojn, kaj ĉiuj ĝin legas – ĉiu longe tenas ĝin en la manoj, ĵetante la rigardon al la pordo, por ke ne eniru cerbero kaj ne forprenu, kaj poste suspiras kaj transdonas al aliulo...

Jes. Ĉi tie kreskas la arboj.

Ili kreskas trans la kontraŭa flanko, malantaŭ la nigra fera ŝirmilo.

La arboj-konspirintoj. La arboj-atestantoj.

Kaj sur ili estas miliono da folietoj, kiuj kapablas bonege paroli.

Elukrainigis Volodimir Pacjurko



JURIJ KLEN

Jurij Klen (vera nomo Oswald Burghardt) naskiĝis la 4-an de oktobro 1891 en la vilaĝo Serbinivka (nun Staro-konstantiniva distrikto de Ĥmelnicka provinco) en la familio de germana negocisto. Germano laŭdevene, li konsideris sin ukraino laŭ la spirito kaj dediĉis sian vivon kaj verkadon al Ukrainio.

La germana lingvo estis hejme, la rusa – en lernejo, gimnazio, universitato „Sankta Vladimiro“¹ kal la ukraina – en la popolamasoj.

Liaj superaj studoj (filologio) estis interrompitaj de la eksplodo de la unua mondmilito. Kiel germana subulo li estis ekzilita al la norda Arkangelska provinco. Reveninte el la ekzilo li fariĝis atestanto de la naskiĝo de suverena ukraina ŝtato, kiun sekvis interna milito. En la jaro 1920 Oswald finis siajn universitatajn studojn, konatiĝis kun kijivaj poetoj-neoklasikuloj¹. Kun la plej fama el ili – Mikola Zerov – li havis feliĉon kune labori (ambaŭ instruis en soci-ekonomia teknika lernejo en la urbeto Bariŝivka, oriente de Kijivo).

En la jaro 1931, kiam ukrainan nacian renaskiĝon pli kaj pli minacis stalinaj repretzaloj, Burghardt elmigras Germanion. Ĉi tie kaj poste en Prago kaj Aŭstrio jam sub la pseŭdonimo Jurij Klen (Georgo Acero) li daŭrigas la kreajn tradiciojn de la kijivaj neoklasikuloj, el la kvinopo de kiuj restis nur Maksim Rilskij kaj li (Mikola Zerov kaj Paŭlo Filipoviĉ estis pafmortigitaj en la jaro 1937 en Sandarmoh², Miĥajlo Draj-Ĥmara pereis en la jaro 1939 en Kolima³). Li tradukis en la germanan iliajn poemojn, kiuj eniris antologion „Dichtung der Verdammten“ („Poemoj de la kondamnitaj“) kun mallongaj skizoj pri ĉiu. Bedaŭrinde la manuskripto ne estis publikigita pro la morto de la kompilinto kaj poste – de Leonid Mosendz, al kiu estis testamentita publikigo de la libro.

La unuaj literaturaj provoj de Oswald aperis en lia juna aĝo. En Germanio li verkis ankaŭ germane. Sed li mem ne estis kontenta pri siaj nacilingvaj poemoj kaj poste reverkis kelkajn el ili ukrainen.



¹ neoklasikuloj – fluo en la ukraina literatura procedo en 20-jaroj de la XX jc., kies kerno estis la menciita en la artikoleto kvinopo. Ili serĉis komunehomajn temojn, konsiderante la ukrainan kulturon ne izolita, sed organika parto de la okcidenteŭropa. Iliaj postuloj jenis: 1) fundamenta studo de tio, kio en la ukraina literaturo estas verkopinta; 2) alproprigo de la atingajoj de la monda literaturo; 3) altigo de la poetika majstreco.

² Sandarmoh – loko en Karelio, kie en la 30-aj jaroj de la XX jc. sovetaj punorganoj amase ekstermis homojn, en tiu nombro plurajn elstarajn reprezentantojn de la ukraina elito.

³ Kolima – nordorienta siberia regiono en la baseno de la samnoma rivero, kie ekde 1934 ĝis 1954 troviĝis multaj punlaborejoj kun escepte pezaj laborkondiĉoj.

jubileoj

La unua poemaro de Jurij Klen „Karaveloj“ aperis en Prago en la jaro 1943. Kulmino de lia verkado estis poemegoj „La malbenitaj jaroj“ (1937) kaj „La cindro de la imperioj“ (1943-1947). La centraj temoj de tiuj ĉi verkoj estas tragika ekstermo de la ukraina kulturo dum la Stalin-tempoj, kontraŭhoma krueleco de la dua mondmilito. Klen verkis ukraine ankaŭ prozon (novelojn kaj skizojn), multe tradukis (el la germana, angla, franca), redaktis ukrainigitan 30-voluman verkaron de Jack London, 8-voluman verkaron de Bernard Shaw, verkojn de Charles Dickens.

Mortis Jurij Klen 30-an de oktobro 1947 en Aŭgsburgo.



Jurij KLEN

CORTÉS¹

1.

Al land' fabela, palm-agava foro,
En kiu nigras faske insular',
Vin pelis tra senlima spac' de l' mar'
Avid' je oro, aventuroj, gloro.

Ornamis ĝi per la purpur-rubando
Sonorajn velojn de la ŝipetar',
Kaj logis ie post la sablo-bar'
Trezor' kaŝita de l' transmara lando.

Dum jaroj flegis vi la revon – nun
Aperas ĝi en bluo de lagun'
Reale, en la ŝton' enkorpiĝinta.

Rigardu: jen trembrilas sub la sun'
Meksik', la urb' kun tegmentar' orpinta,
Glorota en legendoj de l' fortun'.

IX.33

2.

Verŝajne ofte en infana aĝ'
Vi songis la aztekojn¹ malproksimajn,
Orfelajn, strangajn... Vidoj malestimaj
Kun malseren' kaj tristo sur vizaĝ'.

Kaj vidis tra teruro kaj mallum'
Idolofaŭkojn pro varmeg' krevantaj,
Sur vangoj fluis larmoj brilantaj
En la garnaj' de l' incendiofum'.

Vi rememoris, de l' ĉeval' sobiras...
Verdplume Montesumo²-lando brilas!
Ĉu estas ĝi nur mito kaj miraĝ',

Kiu cindriĝos kaj per fumo nigra
Foriĝos, por per flor' unika migra
Ekflori kiel rememor-mesaĝ'?

X.33

Elukrainigis Volodimir Pacjurko

¹ azteko – ano de la indiana popolo,
kiu loĝis en Meksiko.

² Montesumo I (1390-1469) – azteka
gvidanto, kiu unuigis indianajn tribojn
de Centra Meksiko en unu regnon kun la
ĉefurbo Meksikurbo.




FRUAJ ESPERANTIGOJ DE VERKOJ DE IVAN FRANKO

En la jaro 2008, dank' al penado de nelaciĝema laborulo sur la kampo Esperanta – fama ukraina esperantisto Viktor Pajuk, aperis kolekto de esperantigitaj verkoj de Ivan Franko¹ enhavanta 27 poeziajn kaj 4 prozajn verkojn kaj fragmentojn. En la libro la kompilinto menciis: “Esperantigon de la poeta literatura heredaĵo oni komencis en 1960-aj jaroj”. Kaj li pravas, se temas pri amasa sistema tradukado.

Post tiu eldono jam pasis 8 jaroj, kaj oni eksciis novajn faktojn pri la esperantigitaj verkoj de Ivan Franko. En ĉi tiu artikolo mi provis kolekti tiujn faktojn, kiuj koncernas la fruajn (t. e. ĝis ≈ 10 jaroj post morto de la verkisto) tradukojn.

Kelkaj tradukoj de verkoj de Ivan Franko estis faritaj, kiam la verkisto ankoraŭ vivis kaj verkis. La unua publikigita traduko troviĝas en la gazeto “Ukraina Stelo”, n-ro 11-12, 1913. Tio estas kvarverso el la poemaro “Mia Smeraldo”, ciklo “Strofoj”:



IVAN FRANKO

Ne naĝadas kontraŭ vento
De floretoj laodoro,
Sed tra ĉiuj lokoj iras
Bonaj faroj, bona gloro.

Не пливе супроти вітру
Запах квітів і кадила, —
Але йде по всіх усядах
Добра слава, добрі діла.

El ukraina tr. V.A.

Sub la kriptonimo V.A. “kaŝiĝis” Vasil Atamanjuk (1897-1937), postea fama ukraina poeto, kiu sian unuan poemon aperigis esperantlingve². Pri li multfoje skribis nia eminenta samideano Volodimir Pacjurko. Dum Oresto Kuzma-Tagoj-2015 esperantistoj konferencis en Jabluniv, naskiĝurbeto de Vasil Atamanjuk.

Sekvan mencion pri la provo esperantigi verkon de Ivan Franko ni trovas en unu letero al Ivan Franko de Petro Djaliv (Djatlov, 1883-1937), kiu siatempe tradukis ruslingve poemon “Moseo” de Ivan Franko. Petro Djaliv skribis el Prago la 16-an de decembro 1913: “Ĉi tie unu kolego judo tradukas “Moseo”-n esperante kaj petis, ke mi pruntedonu mian tradukon al li. Mi volonte donos al li nun la malneton. Nomiĝas la tradukisto Markus, studento pri medicino”³. Kiu estis tiu Markus, kia estis lia sorto, ĉu sukcesis li fini la tradukon – tion dume scias neniu. Baldaŭ sekvis la Unua mondmilito kaj la poemo esperantlingve ne estis publikigita⁴, aŭ eble eĉ ne estis fintradukita. Kvankam, ankoraŭ en la jaro 1967, ukraina verkisto kaj literatursciencisto Arsen Kaspruk (1919-1982) skribis: “Ankoraŭ dum I. Franko vivis, poemo “Moseo” estis tradukita germane, pole, ruse kaj esperante”⁵. Sed al mi ŝajnas, ke A. Kaspruk legis la menciitan leteron de P. Djaliv kaj konkludis, ke la poemon Markus ne nur provis esperantigi, sed fintradukis⁶. Malgraŭ tio ni povas fari alian konkludon, ke Ivan Franko, dank' al la letero de P. Djaliv, sciis pri Esperanto⁷. Eĉ eble li mem posedis tiun lingvon, ja li entute posedis 20 lingvojn!

En la jaro 1914-a oni festis la 100-jaran jubileon de la naskiĝo de Taras Ŝevĉenko. Por tiu okazo la 12-an de majo Ivan Franko verkis germanlingve la poemon en prozo

historio de la e-movado en Ukrainio

“Widmung” [vidmung] (‘dediĉo’), kiu estis publikigita en viena gazeto “Ukrainische Rundschau” [ukrainiŝe rundŝaŭ] (‘ukraina revuo’) n-ro 3-4, 1914. La unua ukrainigo de tiu poemo aperis en lviva ĵurnalo “Нове слово” [nove slovo] (‘nova vorto’) n-ro 523, 1914. Post tio la poemon oni tradukis en la ukrainan multfoje⁸. Ĝia esperantigita versio aperis en “Ukraina Stelo” n-ro 3-5 (marto-majo), 1914 sub la titolo “Dediĉo”. Tiu numero estis plene dediĉita al Taras Ŝevĉenko, kaj “Dediĉo” komencis ĝin kiel redakcia artikolo. Kvankam nomo de la tradukinto ne estis indikita, Nadia Hordijenko-Andrianova (1921-1998) asertis, ke tiu estis Orest Kuzma⁹, la tiama ĉefredaktoro de “Ukraina Stelo”. Mi ne scias precise, kiam oni aperigis la unuan ukrainan tradukon, sed miaj kalkuloj montras, ke tio estis proksimume la 13-an de junio. Se estis tiel, do povas esti, ke la traduko esperante aperis pli frue ol tiu ukraine. Ĉiuokaze mi povas aserti, ke Orest Kuzma tradukis el la germanlingva originalo¹⁰, sed ne el la ukraina traduko.

Post 100 jaroj, en la jaro 2014-a, estis publikigita dua esperantigo de “Dediĉo” far Volodimir Pacjurko. Ni komparu tiujn du tradukojn:

Ukraina Stelo, n-ro 3-5, 1914, p. 34:

DEDIĈO

Li estis kamparanfilo, kaj li fariĝis princo en la regiono de spiritoj.

Li estis servutulo kaj fariĝis potenculo en la regiono de homa kulturo.

Li estis simpla laiko, kaj estis montrinta al la profesoroj kaj instruituloj novajn, lumajn kaj malfermitajn vojojn.

Li ĝemis dek jarojn sub la rusa soldatpafilo, kaj por libero de Rusujo li faris pli multe, ol la dek venkintaj armeoj.

La sorto persekutadis lin dum vivo, kiel ĝi nur povis, ĝi ne povis tamen ŝanĝi la oron de lia animo en ruston, lian homamon en malamon kaj malestimon, lian dikredon en malesperon kaj pesimismon.

La sorto ne ŝparis al li la suferojn, ne avaris tamen ankaŭ la ĝojojn, kiuj elfluis el la sana vivfonto.

Kaj la plej bonan kaj karan li akiris ĝis post la morto, – ne preterpasatan gloron kaj ĉiam denove ekflorantan ĝojon de milionoj da homkoroj, kiun elvokas liaj verkoj.

Tio estis kaj estas por ni Ukrainoj Taras Ŝevĉenko.

Ivan Franko.

Lvovo, la 12 an de majo 1914.

Taras Ŝevĉenko. “Dumoj miaj, kantoj miaj”. La biblioteko de “Helianto” / Volumo 2, kompilita de V. Pacjurko. – Lucjk, 2014, p. 5:

DEDIĈO

Li estis filo de kamparano kaj fariĝis potenculo en la regno de la spirito.

Li estis servutulo kaj fariĝis giganto en la regno de homa kulturo.

Li estis memlerninto kaj montris novajn, klarajn liberajn vojojn al profesoroj kaj scienculoj-skolastikuloj.

Dek jarojn li suferis sub la pezo de la rusa soldat-trejnado, sed por la libero de Rusujo faris pli multe, ol dek venkintaj armeoj.

La sorto persekutadis lin en la vivo, kiom nur povis, sed ĝi ne kapablis transformigi la oron de lia animo en la ruston, nek lian amon al homoj en malamon kaj orgojlon, kaj la kredon je Dio en malesperon kaj pesimismon.

La sorto ne domaĝis al li suferojn, sed ne domaĝis ankaŭ ĝojojn, kiuj ŝprucis el la sana fonto de la vivo.

La plej bonan kaj valoran trezoron la sorto donis al li nur post la morto – eternan gloron kaj nevelkeblan ĝojon, kiun vekados en la milionoj da homkoroj liaj verkoj.

Tia estis kaj estas por ni, ukrainoj, Taras Ŝevĉenko.

Ivan Franko.

(tr. V. Pacjurko)

historio de la e-movado en Ukrainio

La komparo montras multon da diferencoj. Evidente, Volodimir Pacjurko esperantigis el la plej populara ukraina traduko, kiu laŭ senco (vortelekto) kaj stilo (frazkonstruo) estas pli bona, ol la antaŭaj. Ekzemple, la germanan vorton ‘Fürst’ en la ukrainaj tradukoj oni prezentas diversforme – kaj “князь” kaj “володар” (nun pli populara). Same ni vidas en la esperantaj tradukoj – “princo” kaj “potenculo” (kiu pli konvenas). Krome, ni ne forgesu, ke O. Kuzma en 1914 estis 21-jaraĝa junulo kun tre malgranda sperto en la tradukado. Kontraŭe, V. Pacjurko tradukis la “Dediĉo”-n estinte maturaĝa spertulo kun grandega traduk-akiraĵo. Ĉio tio faras la novan tradukon pli bonkvalita. Sed tiu de O. Kuzma estis la unua.

Post nelonge eksplodis la Unua mondmilito, kaj la 28-an de majo 1916 forpasis Ivan Franko. La unuan, post lia morto, esperantigon de lia verko ni trovas en la jaro 1922. Tio estas la aperigita en “Nova Eŭropo” kaj represita en “Ukraina Stelo” traduko far Jurij Soltykevyc̆ (tiel li mem skribis sian familnomon) esperante titolita “Valoro de la scienco”¹¹ el poemaro “Mia Smeraldo”, ciklo “Parenetikon” (20-a versaĵo):

Dr. I. FRANKO
VALORO DE LA SCIENCO

Malamikoj la gepatroj,
ĉar ne igis klera
filon sian, kies sorto
fariĝos mizera.

Kiel korvon inter pavoj
neniu atentis,
tiel malklerul’ en mondo
humiliĝon sentas.

Іван ФРАНКО
“ВОРОГ БАТЬКО, ВОРОГ МАТИ...”

Ворог батько, ворог мати,
Що не вчили сина!
І піде він в світ блукати,
Як та сиротина.

Як між павами ворона
Поваги не має,
Так невчений в товаристві
Голову схиляє.

(El “Nova Eŭropo”. Trad. J. Soltykevyc̆)

Bedaŭrinde pri Jurij Soltykevyc̆ mi scias tre malmulte. Li aktive agadis tiutempe sur la E-kampo, esperantigis kaj aperigis verkojn de diversaj ukrainaj verkistoj. En la jaro 1922 Jurij Soltykevyc̆ partoprenis la 14-an Universalan Kongreson en Helsinko (Finnlando) kaj salutparolis kiel Delegito de Ukrainio¹². Sekvajare li aliĝis por la 15-a UK en Nurenbergo (Germanio), en la adresaro li estis listigita kiel studento¹³ loĝanta en Praha-Karlin, str. Kaizlova 15.

Kaj fine, la unua esperantigita proza verko de Ivan Franko (ja “Dediĉo”-n oni konsideras kiel poemon en prozo) estis “Mia krimo”, publikigita en la gazeto “Literatura mondo” n-ro 10, 1925. La tradukon faris Oresto Kuzma. Represon de ĉi tiu traduko oni povas legi en “Ukraina Stelo” n-ro 3, 2016, pp. 9-13.

Do, al prezentita de s-ro Volodimir Pacjurko listo de 12 tradukintoj de verkoj de Ivan Franko¹⁴, ni povas aldoni ankoraŭ du personojn – Jurij Soltykevyc̆ kaj Volodimir Pacjurko mem.

La plej multe da poemoj de I. Franko dume estas tradukitaj far Denteto (Jurij Zubik, 1934-2014)¹⁵ kaj, laŭ vortoj de V. Pacjurko, li “meritas esti la plej granda tradukisto de lia [Ivan Franko – V. J.] poezia heredaĵo”.

historio de la e-movado en Ukrainio

NOTOJ:

¹ Ivan Franko: La biblioteko de “Helianto”, volumo 1. / Иван Якович Франко: твори міжнародною мовою есперанто (упорядник Паюк В. Б.). – Луцьк: Надстир’я, 2008.

² Atamaniuk V. Al “Ukraina Stelo”. // Ukraina Stelo, n-ro 1 (13), 1914, p. 2.

³ Теплий Иван. Прижиттєві переклади й автопереклади творів Івана Франка (на матеріалі польської та російської мов). // Проблеми слов’язознавства. 2014. Випуск 63. Стор. 96. – vd. <http://old.lnu.edu.ua/slavistyka/n63/7.pdf>.

⁴ Атаманчук Уляна. Листи Петра Дятлова до Івана Франка. // Науковий вісник Музею Івана Франка у Львові: 70-річчю Музею присвячується. Випуск 9. – Львівський літературно-меморіальний музей Івана Франка, 2010, стор. 268, 270. – vd. <http://dim-franka.lviv.ua/wp-content/uploads/2012/04/Вісник-№9-.pdf>.

⁵ Каспрук Арсен. Поема Івана Франка “Мойсей”. Подихи революції. – vd. <https://arsenkaspruk.wordpress.com/2015/01/11/поема-ивана-франка-мойсей-подихи-пе/>

⁶ En la supremenciita libro [!] estas publikigita traduko de la prologo al “Moseo” far Oleksandr Korolevič (1913-1995). Tiun tradukon unufoje oni aperigis en la jaro 1987.

⁷ Eble I. Franko aŭdis pri E-o ankoraŭ en Kolomeo la 11-an de januaro 1912 dum gastado kaj tranokto en la domo de Leontij Kuzma, la patro de 19-jaraĝa Oresto. Ja Oresto jam de la jaro 1908 posedis la lingvon.

⁸ Unu el inter la tradukoj ŝajne estas farita de Katerina Hruševska (1900-1943), la filino de Miĥajlo Hruševskij. Ŝi ukrainigis “Dediĉo”-n el la angla traduko. En la jaro 2015 estis publikigita traduko far Ivan Teplyj en formo de “dankpreĝo”.

⁹ Помер основоположник українського есперанто Орест Кузьма // Свобода: український щоденник. – Джерзі Ситі і Нью Йорк, вівторок, 28 січня 1969, ч. 18 / Svoboda: ukrainian daily. – Jersey City and New York, tuesday, january 28, 1969, No 18.

¹⁰ Sekvajare (1916) same el la germana tradukis O. Kuzma verkon de Miĥajlo Hruševskij.

¹¹ Franko I. Valoro de la scienco. (El “Nova Eŭropo”. Trad. J. Soltykevyc̆) // Ukraina Stelo, n-ro 2(19), 1922, p. 13.

¹² Esperanta Finnlando. – Aŭgusto-septembro, 1922, p. 42.

¹³ Eble ĝuste tial al li estis proksima ‘valoro de la scienco’.

¹⁴ Paĉjurko Volodimir. Verkoj de Ivan Franko esperante.// Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruševskij – du titanoj de la ukraina kulturo. Materialoj de la sciencpraktika konferenco, la 20-21-an de aŭgusto 2016, Kolomeo-Krivorivno / kompil. V. Paĉjurko. – Lucko, “Helianto”, 2016. – pp. 14-16.

¹⁵ Entute 42 poemoj: “La ŝtonhakistoj” (“Каменярі”), “Pasis temp’...” (“Не пора...”) kaj 40 poemoj el poemaro “Velkinta foliario” (“Зів’яле листя”). Ŝajnas, ke fakte tiu kvanto estas pli granda.



„UKRAINA STELO“: LA UNUA ILUSTRISTO IVAN KOSININ KAJ LA SIMBOLOJ DE LA UNUA KOVRILPAĜO

Dum lastaj jaroj oni jam bone pristudis komencan periodon de la gazeto “Ukraina Stelo”. Estas konataj tiuj, kiuj ĝin iniciatis, redaktis, verkis aŭ tradukis artikolojn kaj poemojn, unuvorte – metis siajn kontribuojn en ties enhavon. Tamen, ĉi tiu listo ne estas kompleta, ĉar la malluma makulo restis demando pri tio, kiu ilustris ĝin.

Serĉado en literaturo, pri la nomo de la ilustristo de la novfondita en la jaro 1913 gazeto, malsukcesis. Verdire, ekzistas unu sciigo, ke la aŭtoro de du vinjetoj de kovrilpaĝo de la gazeto, kiel en la jaro 1913, tiel en la jaro 1914, estas Hnat Kolcunjak. Kaj se konfirmo pri tio, ke Hnat Kolcunjak estas aŭtoro de la gravuraĵo en “Ukraina Stelo” de la jaro 1914, enhavas la gazeto mem (j. 1914, n-ro 2/14, p. 28), sciigo, ke Hnat Kolcunjak estas aŭtoro ankaŭ de la gravuraĵo de la jaro 1913, restis senkonfirma.




Sed la solvo kuŝis sur la surfaco. Mi atentis skribaĵon en la malsupra dekstra angulo de la gravuraĵo. Tiu okazis subskribo kiu rajtigis min konsideri Ivan-on Kosinin-on kiel aŭtoron de la gravuraĵo. Komparante tiun ĉi subskribon kun subskriboj de Ivan Kosinin sur aliaj liaj gravuraĵoj, kiujn mi povis trovi en la retejo, mi konvinkigis, ke mia konkludo estas ĝusta.

Do kiu ja estis tiu nekonata por ni pentristo?

* * *

Ivan Kosinin naskiĝis la 8-an de novembro 1883 en Lvivo. Post abiturientiĝo en Lviva Popollernejo, li dum kvar jaroj studis muzikon ĉe profesoro de Lviva konservatorio A. Volstaf. Samtempe li lernis pentri. Lia patro laboris en apoteka firmao de la ĉeĥa familio Mikolaŝ. Mikolaŝoj, krom negoco, admiris pentrarton kaj fotografarton. Kaj ĝuste de Henrik Mikolaŝ (1872–1931) Ivan Kosinin prenis unuajn profesiajn lecionojn pri pentrarto (interalie, la domo de Henrik Mikolaŝ situas en Lvivo ĉe la strato ‘Ivan Franko’ n-ro 127, ĝuste kontraŭ la domoj de Ivan Franko (n-ro 152) kaj Miĥajlo Hruŝevskij (n-ro 154)).



La talenta junulo ricevis stipendion de la Provinca administrejo sub la kondiĉo, ke li ricevu atestilon de unu el la eŭropaj konservatorioj. Kaj Ivan Kosinin ekvojaĝis tra Galicio kaj Besarabio. En la jaro 1899 li, 15-16 jaraĝa junulo, jam kreis teatrajn dekoraĵojn en la Ukraina popola domo en Bereĵani (nun Ternopila provinco). Finfine, laŭ la rekomendo de fama itala kantisto Montekudo, li fariĝis kursano de la jara muzikkurso en Romo. Tie li fariĝis ankaŭ lernanto de unu el la arternejoj kaj pliboniĝis en pentrarto. Sub la protekto de la sama Montekudo, Ivan Kosinin kreis dekoraĵojn por migra operejo en Italio. Sekvajare li vojaĝis al Sankt-Peterburgo, esperante studentiĝi en la Akademio de artoj. Sed ne sukcesis. El Italio Ivan Kosinin por nelonge revenis hejmen kaj poste iris Varsoviajn, kie studis en la Varsovia konservatorio kaj samtempe – en la prestiĝa arternejo de Voĉeĥ Gerson. El Pollando li vojaĝis por nelonga tempo al Nov-Jorko. Post abiturientiĝo en la Varsovia konservatorio, li denove venis al Usono en Ŝikagon. En Usono kaj Kanado li donis 17 koncertojn kiel violonisto kaj komponisto.

historio de la e-movado en Ukrainio

En la jaro 1904 kanada ĵurnalo “Telegram” (u. Vinipego) skribis kun admiro pri fervora majstreco de la juna violonisto: “... li konsternas per freŝaj impresoj, kvazaŭ per altvaloraj diamantoj, ĉiun aŭskultanton malgraŭ la aĝodiferenco”. Li ne forlasis ankaŭ la pentrarton, faris ilustraĵojn por gazetoj kaj kalendaroj, dekoraciojn por privataj teatroj. Loka societo helpis al Ivan Kosinin veturi Parizon.

Ivan Kosinin daŭris perfektigi en privataj muzikaj studoj en Italio, Francio kaj Belgio ĉe la mondfamaj instruistoj – profesoro Ĥejo kaj violonisto Arlutti. Samtempe li koncertis en Okcidenta Eŭropo. Unu brusela gazeto de la nomo de la societo “Cerde Ly-rigne et Dramatique Euterpe ode Bruxelles”, la 10-an de oktobro 1905 skribis pri la koncerto de la artisto: “Sinjoro Kosinin plenumis siajn du verkojn ‘Danco de sorĉistinoj’ kaj ‘Akvoferoj’”. La originala individueco, natura kaj nekutime moviĝema temperamento inspiris tiujn du fantaziajn kreaĵojn. S-ro Kosinin estas unuaranga virtuozo. Lia violono sen akompano anstataŭigas la tutan orkestron, kantante el la profundo de artista animo. Indas aldoni, ke la sukceso de s-ro Kosinin proksimiĝis al la triumfoj kiujn havas nur plej grandaj artistoj. Lia nomo restos por ĉiam en la memoro”. Krome, en Parizo li ilustris la gazeton “Journal de la Mode”. Ivan Kosinin vojaĝis tra Belgio, Britio, Italio kaj Nederlando. En la jaro 1909 el Nederlando li kiel pentristo-ilustristo vojaĝis al Hindio kaj Malazio en la konsisto de la nederlanda scienca ekspedicio de V. Bujguŝev.

Ekde 1907 Ivan Kosinin ekkontaktis kun membroj de la arta unuiĝo “Juna Muzo” en Lvivo, kiu admiris kaj disvastigis artobranĉon nomatan ‘secesi-stilo’. Ĉi tiu stilo estas konata per diversaj nomoj: en Aŭstrio, Ukrainio kaj Esperante – secesio; en Belgio kaj Francio – ‘nova arto’ (fr. L’Art Nouveau [ar-nuvo]), en Germanio – ‘juna stilo’ (germ. Jugendstil), en Italio – ‘flora stilo’ (ital. stile floreale), en Britio – ‘moderna stilo’ (ang. modern style), en Usono – ‘stilo de Tifani’ (ang. Tiffany style). Tamen, senpera agado de Ivan Kosinin en tiu direkto riviĝis en la jaro 1911, kiam li revenis Lvivon por labori ĉi tie. Li estis adepto de la ideoj de Julian Pankeviĉ en grafika arto. Mi atentigas, ke Julian Pankeviĉ pentris solan faritan de naturo portreton de Ivan Franko. Ĉi tie, en Lvivo, Ivan Kosinin kreis multajn ilustraĵojn por la infana gazeto “Dzvinok” (‘sonorilo’), por gazetoj “Nedila” (‘dimanĉo’), “Dilo” (‘faro’; ‘negoco’), “Svoboda” (‘libereco’), “Ilustrovana Ukrainjina” (‘ilustrita Ukrainio’). Li ilustris libron “Kobzar: Notnij zbirnik” (‘kobzisto: notaro’), kalendarojn de la societo “Prosvita” (‘klerigo’) por la jaroj 1912-1914. Li kreis multajn pentraĵojn, kelkaj el kiuj estis publikigitaj kiel poŝtkartoj en lvivaj eldonejoj de P. Bajda (1913) kaj Hrihorij Hanulak (1914). En la jaro 1912 Ivan Kosinin kreis kovrilpaĝon kaj ilustraĵojn por la libro de V. Paĉovskij “Al Lada kaj Marena – mia dorna fajro”. Siavice, V. Paĉovskij skribis pri Ivan Kosinin artikolon “Violono de Ivan Kosinin” en la gazeto “Ilustrita Ukrainio” n-ro 6, 1913.

Samtempe Ivan Kosinin kreis kovrilpaĝon de la unua gazeto de ukrainaj esperantistoj “Ukraina Stelo”, kiun oni eldonadis en Kolomeo ekde 1913.

Ivan Kosinin, turneante tra la mondo, sukcesis lerni multajn lingvojn. Li posedis la ukrainan, polan kaj ok aliajn lingvojn. Li tradukis el la franca kaj la itala verkojn “Vivo, verkado kaj morto de Stradivari”, “Higieno de violono, alviolono kaj violonĉelo” kaj aliajn. Sed Esperanton li ne posedis, kaj gravuraĵon por “Ukraina Stelo” li kreis laŭ mendo el Kolomeo.

En la jaro 1913 Ivan Kosinin venis Kijivon, kie la komponisto, dirigento kaj instruisto Reinhold Glière ([glier]) invitis lin instrui en Kijiva konservatorio (lernejo de Glière).

Kiam eksplodis la Unua mondmilito, Ivan Kosinin alvenis Vienon. Konata verkistino Olga Duĉiminska rememoris pri li: “Kiam li estis en Vieno en la jaro 1915, li vizita-

historio de la e-movado en Ukrainio

dis restoracion, kaj tie ĉiam sidiĝis ĉe la sama tablo, kaj se li ion rakontis (ja li scipopvis trafte rakonti), la homoj atente aŭskultis; sed kiam li ludis, la violono ploris”.

Reveninte al la patrujo, Ivan Kosinin trafis en la manojn de la potenco de Rusia Imperio kaj en la jaro 1915 li, kiel civitano de Aŭstrio-Hungario, estis ekzilita al Siberio en Tomsk-on. Post du jaroj, kiam ŝanĝiĝis la regantoj, li revenis Kijivon. Sed dum la veturo, kiam li estis en Moskvo, ‘perdiĝis’ multo da muzikaj verkoj, komponitaj de Ivan Kosinin dum lia vojaĝo tra la mondo.

En Kijivo, dum la tempo de Ukraina Popola Respubliko, Ivan Kosinin laboris en la Departamento de fremdaj aferoj. Samtempe, en Kijivo li daŭrigis siajn antaŭajn kontaktojn kun anoj de iama “Juna Muzo”, kaj iĝis membro de la arta unuiĝo “Voloŝki” (‘cejanoj’) en Lvivo. Li ankaŭ kunlaboris kun Kijiva teatro de opereto.

Ivan Kosinin-violinisto ravis junan poeton, kijivan studenton Maksim Rilskij. En la 1918 tiu verkis poemon “Al Ivan Kosinin”.

En la jaro 1919 Ivan Kosinin ilustris serion da poŝtmarkoj “Ukraina ŝtato”.

En la jaroj 1920-1921 Ivan Kosinin denove loĝis en Lvivo kaj tie instruis en Muzika instituto “Mikola Lisenko”. En la jaro 1921 li instruis en Muzika lernejo “Frederiko Ŝopeno” en la urbeto Jaroslav (Pollando). Sed pro embarasa materiala stato li revenas Lvivon kaj, por sensuldiĝi pro loĝej-lupago, li vendis la violonon.

En la jaroj 1928-1930 li loĝis en Argentino. Reveninte al Lvivo, ĝis la Dua mondmilito li laboris kiel pentristo-dekoraciisto en Lviva teatro de opero kaj baletto, kaj instruis en la muziklernejo.

Dum la milito li loĝis en Lvivo kune kun sia fratino. En aprilo 1944, dum la bombado de la urbo, bombo detruis ilian loĝejon kaj neniigis verkojn kaj bibliotekon de Ivan Kosinin. En la jaroj 1944-1945 li kreis skizojn de murpentraĵoj por historia kaj fizika-matematika fakultatoj en Lviva universitato.

Post la milito Ivan Kosinin instruis en Lviva infana muziklernejo, okupiĝis pri ilustrado de libroj.

En la jaro 1956 pentristo Veniamin Siper (1907-1979) kreis grafikan portreton de la artisto.

La 2-an de aprilo 1959 Ivan Kosinin forpasis. Li estis enterigita en Liĉakiva tombejo en Lvivo.

Verkisto Roman Ivaniĉuk (devenas el la vilaĝo Traĉ, nun en Kosiva distrikto de Ivano-Frankivska provinco) en sia romano pri Ivan Franko “Cikatroj sur roko” (publikigita en 1987) priskribis violoniston kaj pentriston Ivan Kosinjuk, kies prototipo estis Ivan Kosinin. Samdistriktano de Roman Ivaniĉuk, poeto Ivan Andrusjak (devenas el la vilaĝo Verbovec en la sama Kosiva distrikto) proksimume en la jaro 1993 verkis poemon “Por memoro de Ivan Kosinin” (poemaro “Ĉasado je Cebaoto”, 1993-1994, aparte ne eldonita).

* * *

Nun ni rigardu la kovrilpaĝon de la “Ukraina Stelo” kaj provu kompreni kion ĉifris la pentristo en la bildo.

Centro de altiro estas virino staranta dekstre. Ŝia rigardo estas direktita al la supra maldekstra angulo kie estas alia virino surfone de ĉaro. La unua virino, sendube, reprezentas la unuiĝitan Ukrainion. Ŝi estas alkatenita je la kruro al la ŝtono kun la nombro 1654, tio estas la jaro ekde kiu Rusio “ĉenis” al si grandan parton de Ukrainio. Sed ĉi virino havas mantelon, sur kies basko estas bildo de leono grimpanta sur rokon – la simbolo de Galicio, kiu tiutempe estis parto de Aŭstrio-Hungario. Tiel la pentristo trans-

historio de la e-movado en Ukrainio

donis ideon de la unuigo. De post la virino rigardetas leono, kiu kvazaŭ embuskas kaj nur atendas oportunan ŝancon. Ĉi tio, sendube, estas simbolo de la potenciala forto de la ukraina popolo. Tiu forto dume ne riveligis, sed venos la tempo kiam ĝi faros sian taskon.

La dua virino estas montrita sur la fono de la ĉaro tirata de cignoparo. Siatempe tio naskis klarigon, ke la virino prezentas muzon. La logiko, ŝajne, estis sekva: la ĉaro kun cignoj estas ĉaro de Apolono, sed Apolono estas la patrono de la muzoj, do ĉi virino estas muzo. Sed tiuokaze kien malaperis Apolono? Kaj ĉu li veturigis la muzojn en sia ĉaro? Mi havas alian klarigon. Ĉaro tirata de la cignoparo estas ankaŭ atributo de la greka diino de la amo kaj beleco Afrodito, kiun la romanoj identigis kun Venuso. Tial mi opinias,

ke ĉi tiu virino estas Afrodito-Venuso. Tion ankaŭ konfirmas paro de kolomboj sur la gravuraĵo, ili same estas simbolaj birdoj de Afrodito-Venuso kaj fojfoje tiradis ŝian ĉaron. La “Iliado” priskribas Afroditon kiel diinon kun brila kaj malseka rigardo. Sur la gravuraĵo ŝi kvazaŭ forviŝas larmon per la maldekstra mano, tio substrekas ŝian brilan kaj malsekan rigardon. Sed samtempe tio ankaŭ elmontras la triston. Kio ja malĝojigis ŝin? Kiel oni vidas, ŝian ĉaron retenas iuj demonaj fortoj.

Malantaŭe kroĉiĝis evidenta diablo. La cignojn per unu mano tenas ia malhela figuro, kaj la alia brako de la figuro, levita super la kapo, similas falĉilon kiun tenas alia figuro malantaŭ. La falĉilo, kiel oni scias, estas la simbolo de la morto. Sed en la sama “Iliado” Afrodito estas nomita ‘la Venkoportanta’ (Nikeforos), ‘la Militema’ (Areia) kaj ‘la Reĝa’ (Basileia), kio donas esperon pri ŝia venko super ĉiuj malhelaj fortoj, premoj kaj malfacilaĵoj.

Tiel la sortoj de la du virinoj similas: ili ambaŭ estas en malfacila situacio, sed esperas ke tio estas provizore, kaj havas la potencialon por venko kaj liberiĝo el la jugo. Sed tio ne estas ĉio, kio kunigas ilin. Kiel jam estas menciite, Afrodito estas la sama Venuso. Sed Venuso estas ankaŭ la nomo de la planedo. Ukraina popolo antaŭlonge rigardadis tiun planedon matene antaŭ la tagiĝo kaj vespere post la sunsubiro. La homoj opiniis, ke tio estis du malsamaj steloj kaj nomis Venuson ‘Matena Stelo’ kaj ‘Vespera Stelo’, aŭ simple ‘Stelo’. Tiele unu virino simbolas Stelon, kaj la alia – Ukrainion, kaj kune ili reflektas la nomon de la gazeto “Ukraina Stelo”. Ukrainio rigardas sian Stelon super kiu leviĝas la suno kun la nombro 1913, tio estas la jaro de la gazetfondo, kaj, samtempe, ĝi simbolas ke la “Ukraina Stelo” alportos vigliĝon en la ukrainan esperanto-movadon anstataŭ senmoveco kaj stagnado.

La gravuraĵo enhavas ankaŭ aliajn simbolojn. En la supra dekstra angulo estas mon-



historio de la e-movado en Ukrainio

trita la ruino kiu simbolas malprosperon, regreson. Sed super ĝi leviĝas la suno kun la nombro 1912, kio evidente simbolas la malon al la regreso, t.e. progreson. Do, ĉi tie estas simbolo reprezentita fondiĝo de la societo “Progreso” en la jaro 1912. Fine, en la dekstra malsupra angulo, kie la artisto metis la subskribon, videblas du birdoj, kies koloro de plumaro permesas difini ilin kiel monedoj. Sed la monedo estas simbolo de Galicio. Probable unu monedo simbolas Orientan Galicion (ukrainan), kaj la alia – Okcidentan Galicion (polan). La monedoj kvazaŭ figurigas pesilon en ekvilibra pozicio, eble tio signifas, ke polaj kaj ukrainaj esperantistoj de Galicio ekde tiu tempo estas en la egalaj kondiĉoj, ĉar jam ĉiuj posedas propran E-gazeton.

* * *

Jen tian vican historion oni sukcesis legi sur la unua kovrilpaĝo de la unua gazeto de ukrainaj esperantistoj.

Viktor JASKOVEC, Ivano-Frankivsk

Максим РИЛЬСЬКИЙ ІВАНОВІ КОСИНІНУ

З тихих струн злетіли птиці
І шепочуть таємниці
Про далекий білий острів серед хвиль і бурунів,
Про далеку пристань мрії,
Де забутий цвіт леліє,
Цвіт минулих, чистих днів.
Тихше... тихше... крила впали...
Струни ніжно заспівали,
Що над нами ясний янгол свій пречистий вид схилив,
Що і нас ще не забули,
Що і нашу тугу вчули
Серед хвиль і бурунів.
Іван АНДРУСЯК

ПАМ'ЯТІ ІВАНА КОСИНІНА

завертай мене боже додому
там дівчата як писанки гарні
там лубка на огризку лубкому
намалюю під муром каварні
там химери злітають з полотен
пастуха леонардо да гойї
там не ждуть покривала для плоті
а сльози аскетично нагої
там в труну підстеляють подушку
там готують салати з кропиви
там лиш скрипка простить і послушно
підє жебрати грошей на пиво



ESPERANTO-FILOKARTIO DE “UKRAINA STELO”

Por plimulto da niaj esperantistoj kaj parte por la publiko estas jam konata la fakto, ke Oresto Kuzma per la gazeto “Ukraina Stelo” multe faris por konigi al la mondo la ukrainajn literaturon, historion kaj kulturo. Tio okazis ne nur per la gazeto mem, sed ankaŭ per apartaj broŝuroj, verkita de li lernolibro de Esperanto. Gravan lokon en ĉi proceso okupis ankaŭ la poŝtkartoj kun la portretoj de eminentaj verkistoj, kun la bildoj de la objektoj, ligitaj kun la vivo kaj verkoj de eminentuloj, kun mapoj de Ukrainio kaj poŝtkartoj pri aliaj temoj.

Entute, laŭ mia kono, sub la ŝildo „Eldono de „Ukraina Stelo“ aperis minimume 11 tiaj poŝtkartoj. La informojn pri ilia apero ni povas trovi en „Ukraina Stelo“, en la ukrainlingva „Viena kalendaro de ukrainaj militaj elmigrintoj por la superjaro 1916“ kaj en la lernolibro de Esperanto, eldonitaj de Kuzma. La poŝtkartojn de „Ukraina Stelo“ eblas dividi je tri periodoj: 1. La antaŭmilita periodo (Kolomeo, 1913) – 5; 2. La milita periodo (Kolomeo – Vieno, 1915-1916) – 5; 3. La postmilita periodo (Kolomeo, 1919) – 1. La unuaj aperis la poŝtkartoj kun la portretoj de Taras Ŝevĉenko kaj Ivan Franko. Tion ni konstatas laŭ la anonco en „Ukraina Stelo“ (n-ro 6-8 / 1913, p. 71): „Kun tiu ĉi nro ni dissendas al niaj jar-abonantoj senpage kiel aldono – Propagandan broŝuron de S-ro Denysiuk, kaj Ukraina-esperantan ŝlosilon. Krom ĝis nun aperintaj poŝtkartoj de niaj poetoj: Ŝevĉenko kaj Franko, aperis niaj eldonaĵoj: Mapo de Ukrainujo kun statistika tabulo, kaj portreto de nia fama poeto el Bukovino – O. J. Fedjkovyĉ. Krom tio estas preparata eldono de nova lernolibro por Ukrainoj“. En la sekva numero de la gazeto (n-ro 9-10 / 1913, p. 89) ni trovas la plenpaĝan reproduktadon de la supremenciita mapo.

En la jaro 1913 aperis ankaŭ la poŝtkarto „Domo, en kiu naskiĝis T. Ŝevĉenko“. La anoncon pri ĝia apero oni ne trovis, sed ke ĝi estis eldonita ĝuste tiam, atestas la akirita de mi en aŭkcio tiu ĉi karto, sur la adresa flanko de kiu legeblas letereto: „Lemberg¹

29/I 1914. Estimata sinjoro! Mi legis en la gazeto „Esperanto“ ke vi kolektas poŝtmar. kaj fotografaĵojn. Se vi volas, bonvolu sendi al mi diversajn poŝtmarkojn de via lando kaj kelkajn originalajn ĥinajn poŝtkartojn. Mi ankaŭ tuj sendos al vi diversajn poŝtm. de Aŭstrio, Rumanujo, Hungarujo kaj Bosnujo kaj diversajn fotografaĵojn, ĉar mi estas amatoro-fotografisto.

Akceptu mian koran saluton [subskribo]. Aleksandro Sopotnicki, Lemberg, str. Glemboka 14, Aŭstrio“. Kaj la adreso de la ricevonto estis pli ol stranga: „Al estimata sinjoro Petro Danthine, Taĉmento Belga, Pekin.“ Ni aldonu, ke en 1912 Sopotnickij estis unu el la gvidantoj de Lviva societo de ukrainaj esperantistoj.

Pri la sekva serio da poŝtkartoj informas „Viena kalendaro“: Накладом редакції вийшли отсі видання:

Переписні листки з есперантсько-німецько-українським текстом:

- 1) Мапа України.
 - 2) Ю. Крайківський: Каменярі – Пасаж баталантој.
 - 3) Президія „Союза визволення України“.
 - 4) З життя українських емігрантів у Відні (Виплата запомоги і Перед церквою).
- Kaj nun pli detale pri la poŝtkartoj de „Ukraina Stelo“ mem (per asterisko mi signas

¹Lemberg – la germanlingva nomo de Lvivo.

historio de la e-movado en Ukrainio



la kolektitajn de mi poŝtkartojn kaj transdonitaj al al la muzeo de Oresto Kuzma).

1. Portreto de Taras Ševčenko (1913). Sur la fronta paĝo estas reproduktaĵo de la gravurita far la pentristo K. Adt portreto de la poeto, farita laŭ la foto de la sanktpeterburga fotisto Henriĥ Denjer. La karto estas subskribita en kvar linioj: Taras Ševčenko. || La plej eminenta ukraina poeto. || * 1814 en Morynci (Kieva gubernio.) † 1861. || Lia ĉefverko „KOBZAR“. Sur la adresflanko: supre meze: POŝTA KARTO.; vertikala surskribo de malsupre supren inter du paralelaj linioj, dividantaj la karton je du partoj: Eld. „UKRAINA STELO“ esperanta gazeto en Kolomea; vertikala surskribo sur la maldekstra rando: Lernu Esperanton! Учiть ся Есперанта!; sur la adresparto: Al _ [kaj kvin linioj por la nomo kaj adreso].



2. Portreto de Ivan Franko (1913)*. Sur la karto estas reproduktaĵo de la portreto de

Franko, subskribita en tri linioj: D-ro Ivan Franko. || Ukraina scienculo, poeto kaj verkisto. || (1913. estas jaro de lia 40-jara verkista jubileo). Surskriboj sur la adresa flanko: supre meze: POŝTA KARTO.; vertikala surskribo de malsupre supren inter du paralelaj linioj, dividantaj la karton je du partoj: Учiть ся мiжнародноi мови „Есперанто“!; vertikala dulinia surskribo sur la maldekstra rando: 30 % чистого доходу на дар для I. Франка || Eld. „UKRAINA STELO“ esperanta gazeto en Kolomea 360 Nova; sur la adresparto: Al _ [kaj kvin linioj por la nomo kaj adreso].

3. Mapo de Ukrainio (1913). Esperanlingva. La aperon de la mapo en la poŝtkarta formo atestas la reklamo en „Ukraina Stelo“ (n-ro 9-10 / 1913, p. 89): Tiu ĉi mapo estas ricevebla kiel poŝtkarto. Prezo 100 pecoj = 5 K.; 50 p. = 3 K. afrankite). Mendu al Redakcio Ukr.

St. Surskribo sur la mapo mem, malsupre en kadreto: Mapo de teritorio, || kiun loĝas Ukraina popolo.

4. Jurij Osip Fedkoviĉ (1913)*. Subskribo sub la porteto: Осип Юрiй Федькович.

Surskribo sur la dekstra parto supre, en du linioj: Osyp Jurij Fedjkovyĉ || Ukraina poeto kaj verkisto *1834 †1888. Surskriboj sur la adresa flanko: supre meze: POŝTA KARTO; vertikala surskribo de malsupre supren inter du paralelaj linioj, dividantaj la karton je du partoj: Учiть ся мiжнародноi мови „Есперанто“!; vertikala surskribo sur la maldekstra rando: Eld. „UKRAINA STELO“ esperanta gazeto en Kolomea 360 Nova; sur la adresparto: Al _ [kaj kvin linioj por la nomo kaj adreso].



historio de la e-movado en Ukrainio



5. Domo, en kiu naskiĝis T. Ŝevĉenko (1913)*. Subskribo sub la bildo: Domo en kiu naskiĝis la plej eminenta ukraina poeto kaj profeto „TARAS ŜEVĈENKO“. Surskriboj sur la adresa flanko estas la samaj, kiel sur la karto 1.

6. Mapo de Ukrainio (1916). Esperantlingva. La esperanta surskribo estas lokita en kadreto en la maldekstra malsupra angulo: Lando kie loĝas

35.000.000 da Ukrainoj. Subskribo sub la mapo germane kaj ukraine: Wohngebiet der Ukrainer. – Простір заселений Українцями. Pri la surskriboj sur la adresflanko mi ne scias.



7. Julian Krajivskij, „Pacaj batalantoj“ (1915)*. Sur la fronta paĝo estas reproduktajo de la bildo de Julian Krajivskij „Ŝtonhakistoj“, pentrita laŭ la motivoj de la fama samtitola poemo de Ivan Franko. Krajivskij estis samaĝulo



de Kuzma, lernis en Kolomea gimnazio. Ekde 1915 studis en Viena Artakademio. La menciitan bildon pentris en la jaro 1915. Subskribo sub la reproduktajo en Esperanto kaj en la ukraina: J. Krajivskij: Pacaj batalantoj || Ю. Крайківський: Каменярі. Surskriboj sur la adresa flanko: supre meze: Poŝta karto; sub ĝi la vertikala surskribo de supre

malsupren, dividanta la adresan flankon je du partoj: Eldono de „Ukraina Stelo“. en Kolomea – 1915.; sur la maldekstra rando surskribo de supre malsupren ukraine: Учiть ся міжнародної мови Есперанта!

8. Prezidio de Unuiĝo por liberigo de Ukrainio (ULU) (1916)*. ULU estis politika organizaĵo, kreita en Lvivo en aŭgusto 1914, kies ĉefa celo estis kreo de sendependa kaj unuiĝinta Ukrainio.



historio de la e-movado en Ukrainio

Sur la averso de la poŝtkarto estas surskriboj: sub la foto ukraine: Вол. Дорошенко, Андр. Жук, Вол. Козловський, Мар. Меленевський; sur la dekstra rando de malsupre supren surskriboj en tri linioj esperante, ukraine kaj germane: Estraro de la „Ligo por liberigo de l' Ukrainujo“. || Президія „Союза визволення України“. || Präsidium des „Bundes zur Befreiung der Ukraina“. Surskriboj sur la adresa flanko: supre meze: Poŝta Karto.; sub ĝi la vertikala surskribo de supre malsupren, dividanta la adresan flankon je du partoj: □ □ Eldono de „Ukraina Stelo“. en Vieno. 1916. □ □; sur la maldekstra rando surskribo de supre malsupren ukraine: Учїть ся міжнародної мови Есперанта!

9. El la vivo de ukrainaj elmigrintoj en Vieno. Antaŭ la preĝejo (1916). Bedaŭrinde, mi ne povis sciigi, kiel aspektis la poŝtkarto. Eblas nur supozi, ke sur la fronta paĝo estis lokita la foto, farita de O. Kuzma, trovebla en la „Viena kalendaro...“ (p. 25), subskribita: Українські воєнні емігранти перед церквою св. Варвари у Відни (19. XII.1915. Фот. О. К.).

10. El la vivo de ukrainaj elmigrintoj. Elpago de monhelpo (1916). Kun tiu ĉi karto mi havas la samajn problemojn, kiel ĉe la karto 9. La fonto de la poŝtkarto estas la foto el la „Viena kalendaro...“ (p. 17): Український запомоговий комітет у Відни (фот. О. К.). Interesatoj povas trovi la fotojn, el kiuj fontas la poŝtkartoj 9 kaj 10, en la interreto: <http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=vik>



11. Mapo de Ukrainio (1919)*. Ukrainlingva. En la maldekstra malsupra angulo estas la tridento kaj surskribo ukraine: УКРАЇНА та її СУСІДИ. Surskriboj sur la adresa flanko; supre meze ukrainlingve: Переписний листок.; sub la supra surskribo estas vertikala surskribo de supre malsupren: Видання „Ukraina Stelo“ в Коломиї 1919. року.

Ĝenerale la E-filokartio de „Ukraina Stelo“ ankoraŭ ne estas sufiĉe esplorita. El la ĝisnunaj mencioj pri ĝi la plej plenaj apartenas al Valerij Kovtun, fama kolomea filokartisto, kiu en sia libro «Золота доба коломийської листівки» („La ora epoko de kolomea poŝtkarto“) mencias 6 poŝtkartojn: la portretojn de Ŝevĉenko, Franko, Fedkoviĉ, la domon de Ŝevĉenko, „Pacaj-n batalantoj-n“ kaj la mapon de Ukrainio (1919). Bedaŭrinde, li mise indikas la eldonjaron de la poŝtkartoj 1 kaj 5 – la jaron 1922 anstataŭ la jaro 1913.

La unua mencio pri la poŝtkarto „Pacaj batalantoj“ apartenas al Ivan Kejvan, abituriento de Kolomea gimnazio, kiu lernis Esperanton en la kurso, organizita de O.Kuzma (artikolo «Образотворчі мистці Коломийщини» („Artistoj de Kolomea regiono“) en la libro «Коломия й Коломийщина (Збірник споминів і статей про недавнє минуле)» („Kolomeo kaj Kolomea regiono (Kolekto de rememoroj kaj artikoloj pri la antaŭnelonga pasinteco)“, Filadelfio, 1988. Siajn rememorojn Kejvan skribis jam en maljuna aĝo, do povis forgesi, ke „Ukraina Stelo“ ne estis „esperantista klubo“, kiel li skribis, sed la gazeto.

Tiun ĉi poŝtkarton menciis ankaŭ Ihor Koval en sia artikolo «Сини світла і краси

historio de la e-movado en Ukrainio

народжуються в Різдвах» („La filoj de lumo kaj beleco naskiĝas en Rizdvjano“ [naskiĝvilaĝo de J. Krajkivskij – V. A.] en la gazeto «Галицьке слово» (“Haliĉa vorto“) de 10.08.2012. Kaj denove miso – li skribas, ke ĝi „estis presita de la artista klubo en Kolomeo“, kiu neniam ekzistis.

Mia artikolo ne pretendas esti elĉerpa informo pri la E-filokartio de „Ukraina Stelo“. Ĉi temo sendube bezonas pliajn studojn. Mi esperas, ke ĝi ekinteros la esperantistojn, kiuj okupiĝas pri la historio de E-movado en Ukrainio.



Volodimir PACJURKO

VASIL BOBINSKIJ EN NOVA HIPOSTAZO

En la scienc-praktika konferenco, dediĉita al la jubileoj de Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruŝevskij, la partoprenintoj de la Oresto Kuzma-tagoj 2016 havis eblecon aŭskulti ineteresaĵn prelegojn ligitajn kun la historio de E-movado en Orienta Galicio. Dank’ al ili ni eksciis novajn, foje sensaciajn faktojn. Persone min ekinteresis la prelego de s-ro Jaroslav Matvijišin „Leteroj de Oresto Kuzma al Miĥajlo Hruŝevskij kaj de Vasil Bobinskij al Miĥajlo Jackiv“¹. La letero de O. Kuzma (fakte ĝi estis kolektiva letero en la nomo de la E-societo „Progreso“ en Kolomeo) ankoraŭfoje konfirmas lian multflankan agadon pri la propagando kaj disvastigo de la internacia lingvo. Kiel redaktoro de „Ukraina Stelo“ Kuzma celis kolekti opiniojn de ukrainaj eminentuloj pri Esperanto. Kaj en marto 1913 la progresanoj sin turnis al Hruŝevskij kun la peto esprimi sian opinion.



¹ Матвійшин Я. Листи Ореста Кузьми до Михайла Грушевського та Василя Бобинського до Михайла Яцків / у кн.. «Іван Франко та Михайло Грушевський – два велети української культури. Матеріали науково-практичної конференції 20-21 серпня 2016 року, Коломия-Криворівня». – Луцьк, «Геліанто», 2016, с. 39-48.

historio de la e-movado en Ukrainio

Kun proksimume simila peto, sed jam 3 jarojn poste, en oktobro 1916, Vasil Bobinskij, pri kiu mi iam skribis kaj prelegis², sin turnis al Miĥajlo Jackiv, tiutempa renoma verkisto-modernisto. Bobinskij detaligas sian peton: li deziras scii de la adresito, ĉu la internacia lingvo ĝenerale necesas, ĉu ĝi kiel la lingvo artefarita taŭgas por beletro kaj poezio, ĉu la problemo de la internacia lingvo estas solvebla almenaŭ en plimulto de necesaj kondiĉoj. Sed la ĉefa kaŭzo, pro kiu la leteraŭtoro sin turnas al Jackiv – informi lin pri apero de la traduko de lia verketo „Pegazo“ en la gazeto „Germana Esperantisto“ kaj pri eventuala publikigo de liaj tradukoj el aliaj ukrainaj verkistoj en la sama gazeto en estonteco. Bobinskij ekskuzas sin, ke li faris la tradukon sen la permeso de la aŭtoro pro neeblo kontaktiĝi kun li. „La menciita redakcio, – skribas Bobinskij, – pagas al mi nenion por mia laboro kaj mi ne postulas la pagon, estante konvinkita, ke la merito mem enkonduki la ukrainan literaturon en la mondan devas esti por mi rekompenco“.

Ĝis la apero de la artikolo de Matvijiŝin ni preskaŭ ne konis Bobinskij-n kiel tradukiston, se ne menciis la anoncon en „Viena kalendaro de la ukrainaj militaj elmigrintoj por la superjaro 1916“, eldonita de „Ukraina Stelo“, kiu diris:

„Baldaŭ aperos jenaj broŝuroj:

M. Hruŝevskij: Resumo de l'ukraina historio. (Перегляд історії України). 3 кар-
тою України. Ціна 20 сот.

O. Kuzma: Mil da vortoj pri l' Ukrainioj. (Тисяч слів про Українців). Ціна 20 сот.

O. Kuzma: Ukraina sorto. (Українська доля). 3 картою України.

Д-р Л. Заменгоф: Міжнародня мова Есперанто. Передмова та повний підруч-
ник. Переклав В. Бобинський. (kursivo nia – V.P.)

Ukraina antologio. (Українська антологія). 3 передмовою О. Кузьми.

Іван Чепига: Міжнародня мова Есперанто і українське питання. (По українськи).

En ĉi anonco Bobinskij aperas en la nova hipostazo – kiel tradukisto. Se diri pri la tradukita verko, temas, verŝajne, pri Unua Libro, eldonita en 1887.

Instigita per la letero de Bobinskij al Jackiv mi senprobleme trovis la tradukon de „Pegazo“ en „Germana Esperantisto“. Ĝi estis en la n-ro 7B (180), julio, 1915, p.75. Surprize mi rimarkis en la sama numero (p. 74) lian alian tradukon – „Peza-n kruco-n“ de Modesto Levickij. La ambaŭ tradukoj estis subskribitaj „El ukraina lingvo esperantigis Vasyl Bobynskij“.

En la sama gazeto du jarojn poste ni trovas plian tradukon de Bobinskij: en la n-ro 1B, januaro 1917, aperis la traduko de la rakonto de Stepan Kovaliv „El praktika lernejo“ (p. 4-5), subskribita „El ukraina lingvo tradukis Vasyl Volodymyr Bobynskij“.

En la sekva jaro en la n-ro 6B, junio 1918, oni presis la tradukon de „Fratino Helenjo“ de Vasyl Ĉajĉenko³ (p. 43-44), kiu estis daŭrigita en la n-ro 7B, julio 1918, p. 49-52 (subskribite „Esperantigis Vasyl Volodymyr Bobynskij“). Kaj en la n-ro 9/10B, septembro-oktobro 1918, sur la p. 100-102 aperis rakonto „Floro de l'feliĉo“ de Bohdan Lepkyj kun la subskribo „Tradukis Vasyl Volodymyr Bobynskij“. Ĉi traduko estis la lasta el la publikigitaj tradukoj de Bobinskij en la gazeto.

² Vidu: Пацюрко V. La tri kaj unu (Vasil Atamanjuk, Mirosлав Ірчан, Ivan Tkaĉuk, Vasil Bobinskij – ukrainaj esperantistoj kaj verkistoj) /у кн. Роль часопису „Ukraina Stelo“, його редактора О. Кузьми в популяризації української історії, літератури й культури в світі та ідей міжнародної мови есперанто в Галичині. Матеріали науково-практичної конференції 12-13 жовтня 2013 року, м. Коломия// упорядник В.П.Пацюрко. – Луцьк, «Твердиня», 2013, с. 54-57.

³ Vasil Ĉajĉenko – pseŭdonimo de Boris Hrinĉenko.

historio de la e-movado en Ukrainio

Kaj Bobinskij mem tiutempe jam delonge militis – en 1917-1918 li estis en la vicoj de Legio de ukrainaj siĉpafistoj, poste – en Ukraina Galicia armeo.

Bedaŭrinde, ni ne scias (ni esperu – dume!), ankoraŭ kiujn verkojn el la ukraina literaturo tradukis Bobinskij. Li ja apartenis al IAREV – Internacia Asocio de revoluciaj E-verkistoj kaj certe povis daŭrigi esperantigon de ukrainlingvaj verkoj aŭ verki mem en Esperanto.

El la letero de Bobinskij, trovita en arkivoj far J. Matvijišin, kaj el la publikaĵoj en „Germana Esperantisto“ ni eksciis, ke Bobinskij havis duoblan antaŭnomon – Vasil Volodimir. Sed, sendube, pli grava por ni estas la fakto, ke li tradukis esperante ukrainan beletron. Jen tiel, guton post gutu, ni povas kompletigi la historion de nia movado, malkovri novajn, nekonatajn ĝis nun paĝojn el la vivo de niaj E-pioniroj.



Aldonaĵo al la historio de E-movado en Ukrainio

En la kolekto de esperantaĵoj de Zinovij Korn (la domo-muzeo de O. Kuzma en Kolomeo) mian atenton altiris libreto: V. Kotelevcev. Систематический курс международного языка эсперанто (Por kursoj). Eld. de D.U.E. г. Луганск, 1920.

Ĝi estas 20-paĝa broŝureto de la formato A5. La kurso estas dividita je 12 lecionoj. La unua leciono estas dediĉita al la alfabeto kaj sonoj, la dua kaj ceteraj – al vortspecoj (substantivo, adjektivo, pronomo, verbo ktp.).

Ĉiu leciono estas dividita je paragrafoj. La lasta paragrafo de la leciono indikas specon de praktika laboro, ekz. «чтение, разбор и диктант», «переводы письменные» ks. En la fino de la lecionoj estas kadretoj kun lernitaj leksemoj. La reguloj estas ilustritaj per kelkaj ekzemploj, parto el kiuj ne estas tradukita, ekz. en la kvina leciono (p. 9): § 45. Глаголы изъявительного накл. будущего времени (tempo estonta) оканчиваются на os. Mi skribos – я напишу, ili legos – они прочтут. Mia amiko veturos en Parizon. Ili alveturos al ni. Ni iros promeni en arbaron.

En la kurso mankas vortareto. Antaŭparolo forestas. La broŝuro finiĝas per malgranda teksto „Esperanto kaj lingvoj naturaj“ de C. Burle kaj „La espero“ de L. L. Zamenhof.

Ĉu la legantoj de „Ukraina Stelo“ konas ĉi lernilon? Kiu scias ion pri la aŭtoro, kio estis D.U.E.? Mi pensas, ke ĉia informo pri la libreto estos plia aldoneto al la historio de E-movado en nia lando.



Lidia RIPECKA, Kolomeo

NIA KALEJDOSKOPO



■ La 29-an de septembro en la sveda ambasadejo en Kijivo Petro Palivoda enmanigis al la unua sekretario de la ambasadejo Henrik Norberg la tradukitan en la ukrainan lingvon libron de Kalle Kniivilä “Krimo estas nia. Reveno de la imperio”. Ni volas memori, ke la libro de la sveda finndevna aperis en la unua datreveno de la rusa aneksio de Krimo en la tri lingvoj – la sveda, la finna kaj Esperanto.

Ukrainigis la libron Petro Palivoda, Volodimir Hurtovenko, Mikaelo Lineckij, Oleksandr Hriŝenko kaj Olena Poŝivana. Redaktis la tradukon Volodimir Pacjurko. P.Palivoda ankaŭ prizorgis la eldonon de la libro, komence en la

reto kaj poste prese en la Kijiva eldonejo Tekstover.

Ĉar la libro tuj fariĝis raraĵo (ja estis presitaj nur 50 ekz.), interesantoj povas legi kaj elŝuti ĝin en la reto; <http://tekstover.in.ua/348/> (*inf. P.P.*).

■ La forumo de la eldonistoj aŭ pli simple – libroforumo en Lvivo – estas sendube grava kultura evento. Ĉi-jare ĝi okazis la 23-an fojon. Siajn librojn prezentis pli ol 320 eldonejoj.

Estas agrable informi, ke ĝin certamaniere partoprenis ankaŭ ukrainaj esperantistoj (krom la lvivaj venis e-oj el Kijivo, Lucko, Donecko, Kolomeo). Dum la forumo sur la aleo antaŭ la operejo funkciis E-budo, organizita de Sergeo Ŝmatkov. Enkadre de la forumo okazis du kunvenoj de esperantistoj. En la unua, la 17-an de septembro, prelegis Olga Kerzjuk el Londono pri la kolekto de E-libroj en la Brita Biblioteko. En la dua, okazinta sekvatage, prelegis d-ino Nina Daniljuk pri instruado de Esperanto kaj E-centro en Lucko.

Konklude: la ideo renkontiĝi dum la forumo estas bonega, sed tiajn renkontiĝojn necesas pli serioze prepari. (*inf. V.P.*)



movado

■ La 20-21-an de oktobro en la Orienteuropa Nacia Universitato “Lesja Ukrainka” en Lucko surbaze de la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko kaj Esperanto-centro estis organizita la sciencpraktika ronda tablo “Modernaj metodoj de lingvoinstruado en nuntempa lernejo”. Krom



voliniaj esperantistoj venis Sergeo Ŝmatkov (Lvivo) kaj Andreo Jankovskij (Kijivo). Dum la kunsido de E-sekcio prof. Nina Daniljuk trovis interesajn vivekzemplojn, atestantajn viglan E-vivon en diversaj landoj kaj novajn ventojn en la metodoj de la instruado de la fremdaj lingvoj. A.Jankovskij prezentis la nuntempan realecon kaj eblecojn en la uzado de la elektronikaj teknologioj por la lingvoinstruado. Niko Vološin rakontis pri la libroeldonado enkadre de UkrEA kaj prezentis manplenen da libroj, vera ornamo de ĉi prezentado certe estis la vortarego de V.Pacjurko kaj la verkaroj de T.Ŝevĉenko kaj I.Franko.

Fine de la oficiala parto la partoprenantoj estis invititaj en la “francan” ĉambron, kie ili tute surprize estis regalitaj per kelkaj vere belegaj improvizaĵoj per la elektronika klaviro. La oreloj de kelkaj esperantistoj divenis eĉ la melodion de “Vivu la stel!”

(inf. I.Lurd).



LINGVOKONSULTEJO

Nia leganto S.P. demandas: ĉu eblas uzi la vorton „baro“ en la signifo „start-rinkejo“.

La respondo: Nia lingvo konstante disvolviĝas kaj lastatempe estas rimarkebla la tendenco aldoni al vortsignifoj registritaj en PIV kaj NPIV pliajn signifojn. Tio koncernas ankaŭ la menciitan vorton. Pluraj vortaroj registras tiun signifon, ekz. Itala-esperanta vortaro de C.Minnaja (1996), Granda germana-esperanta vortaro de E.-D.Kraŭse (2007), Granda hispana-esperanta vortaro de F.de Diego (2003), Granda franca-esperanta vortaro sub la redakto de J.Le Puil kaj J.-P.Danvy (1992), Esperanta-pola vortaro de T.Michalski (1991), Granda esperanta-ukraina vortaro de V.Pacjurko (2015) k.a. Rimarkeblas, ke en nuntempaj baroj preskaŭ neniu trinkas/ drinkas stare. Tial la vortoj „startrinkejo“, „stardrinkejo“ aspektas iom arkaikiĝintaj. Kiun formon alpreni kaj en kiu teksto dependas de la lingvouzanto – ambaŭ formoj estas uzablaj.

KIE LOĜAS SANKTA NIKOLAO?



Sankta Nikolao Miraklofaranto estas adorata de la diversritaj kristanoj – ortodoksuloj, rom- kaj grekkatolikoj. Tuta lia vivo estis plena de bonfaroj kaj mirakloj. Eklezio glorigas lin kiel rapidan helpanton por ĉiuj embarasitoj, afliktitoj kaj mizeruloj. La sanktulo helpis dronantojn, liberigis kaptitojn, savis de la mortpuno senkulpulojn, resanigis malsanulojn. Oni konsideras lin prizorganto de soldatoj, stirantoj, vojaĝantoj, patrono de infanoj kaj studentoj, maristoj, komercistoj kaj arkpafistoj. La tago de lia morto (la 6-a de decembro aŭ la 19-a de decembro laŭ la julia kalendaro) oni celebras kiel la feston de Sankta Nikolao.

Senpacience atendis la feston infanoj: ili kredis, ke en la nokto antaŭ la festo la sanktulo venas al ĉiu domo pridonaci infanojn. Vekiĝinte, ili tuj rigardis sub la kusenon por

trovi la donacon. Komence tio estis bombonoj kaj fruktoj, poste ankaŭ vestoj kaj ŝuoj. La nuntempaj donacoj ofte estas riĉaj kaj luksaj – poŝtelefono, komputilo, biciklo ktp.

Reformacio forigis la sanktulkulton el la protestantaj eklezioj. Komunisma reĝimo anstataŭigis lin per Avo Frosto. En Usono aperis kaj tre rapide konkeris Eŭropon Santa Klaus. Pro tio Sankta Nikolao ne ĉiam estis plenrajta en Ukrainio. Fidela al li restis la okcidenta parto de la lando. Sed la sanktanikolaaj tradicioj renaskiĝas nun en la ceteraj landopartoj.

Ĉar Santa Klaus kaj Avo Frosto havas siajn rezidejon, sian bienon ekde la jaro 2006 havas ankaŭ Sankta Nikolao. Ĝi troviĝas sur la teritorio de la Nacia naturparko „Huculio“ en la vilaĝo Pistin (ukr. Пістинь) de Kosiva distrikto (Ivano-Frankivska provinco). Ĝi servas kiel turista-arta centro kaj muzeo, okupiĝas pri bonfarado. En la bieno infanoj povas lerni popolajn metiojn: teksadon, potfaradon, lignoskulptadon, brodadon, ovopentran arton k.a., funkcias la majstroklaso, kie infanoj povas memstare fari popolajn infanludilojn. Ĉi tie funkcias ankaŭ poŝtejo de la sanktulo. Infanoj el la tuta Ukrainio skribas leterojn al Sankta Nikolao, petas lian helpon por malsanuloj kaj mizeruloj kaj ankaŭ la donacojn por si, kaj nepre ricevas respondojn. Sur la teritorio de la bieno kaj en la domo mem okazas diversaj festivaloj. Vintre ĉi tie eblas sledi kaj skii. Dum la OKT-2016 ukrainaj esperantistoj vizitis la bienon, ekskursis tra la domo de Sankta Nikolao.



Informis Vasil VOROBLEVSKIJ, Lvivo



Hannes LARSSON (Finnlando)

LA SKIKURADO

Usono. Fino de la konkurso en Hayward

Baldaŭ post la apero de la tria ĉi-jara numero de nia gazeto venis al la redakcio letero de la finna esperantisto Hannes Larsson, kiu skribis, ke li legis en «Ukraina Stelo», ke en Bukovelo eblas vintre skii, kaj proponis por publikigo sian artikolon pri skikurado. La artikolo montriĝis al ni interesa, kaj ni petis s-ron Larsson rakonti kelkvorte pri si. Jen kion li skribis:

«Mi naskiĝis en Nokia, Finnlando, en 1931. Mi diplomiĝis en la teknika universitato en Helsinko kaj specialiĝis pri la rezisto de materialoj kaj konstrukcioj. En tiu kampo mi laboris mialande kaj ankaŭ en Francio, Italio kaj Belgio ĝis mia emeritiĝo en 1991.

Mi esperantistiĝis en 2006 kaj tuj entuziasmiĝis pri la lingvo tiagrade, ke mi jam prelegis en la Ukoj en 2014 kaj 2015 kadre de la Kongresa Universitato. Sed mia unua kontakto kun Ukoj okazis en Bialystok (2009), kie mi organizis seminarion pri distraj matematikoj».



Kaj jen la artikolo mem:

La skikurado estas vintra sporto sur la neĝo. Homoj uzis skiojn antaŭ miloj da jaroj; la plej malnova peco de skio, trovita ie en Rusio, havas 8000 jarojn. Post la 19-a jarcento la skioj kaj bastonoj rapide evoluis pro la apero de vintraj sportoj. Verŝajne ĉiu el ni iam vidis televidajn elsendojn de skikurado en la Olimpiaj Ludoj. Sed la skikurado estas

ne nur sporto de ĉampionoj, sed ankaŭ populara sporto. Mi opinias, ke ĝi estas la plej bona sporto: ĝi laborigas la koron, la pulmojn kaj ĉiujn muskolgrupojn de la koro: la dorson, la ventron, la brakojn kaj la krurojn. La skikurado okazas en la naturo, kie oni spiras puran aeron.

Mi komencis skikuradi en mia naskiĝurbo Nokia, Finnlando, kiam mi havis iom malpli ol tri jarojn. Por Kristnasko mi ricevis skiojn kaj la sekvan tagon mi glitis (ne marŝis, kiel nejunaj komencantoj kutimas fari) sur la neĝo. La feliĉa rido de miaj gepatroj estas la plej malnova memoraĵo de mia infaneco. Multajn jarojn poste mi praktikis ankaŭ alpan skiadon, kiun mi lernis tre rapide, ĉar mi havis jam la esencan senton de ekvilibro kaj kapablis turni kun paralelaj skioj. Post unu semajno mi atingis la nivelon «konkursoj» kaj dum kelkaj jaroj mi partoprenis konkursojn de slalomo kaj giganta slalomo. Sed atinginte la aĝon de 45 jaroj mi definitive revenis al la skikurado. Nun mi havas 85 jarojn kaj mi daŭre skikuradas almenaŭ 1000 kilometrojn jare. Okazas ankoraŭ, ke mi venkas junulojn en skikuradkonkurso, sed mi havas bonan ekskuzon: mi havas 82 jarojn da sperto.

En la jaro 1977 mi interesiĝis pri la popularaj longdistancaj skikuradkonkursoj. Oni trovas tiajn konkursojn en multaj lokoj en la tuta mondo. Sed la afero, kiu kaptis mian entuziasmon, estis la serio, nomata Worldloppet (world = mondo, «loppet» estas sveda vorto por skikuradkonkurso). Worldloppet estas la internacia federacio de organizantoj de popularaj longdistancaj skikuradkonkursoj. Tiu serio entenas nun 20 konkursojn en 20 landoj (nur la plej bona konkurso de ĉiu lando povas aparteni al Worldloppet).

Ili estas 13 eŭropaj landoj: Islando, Norvegio, Svedio, Finnlando, Estonio, Francio, Svislando, Germanio, Aŭstrio, Ĉeĥio, Pollando, Italio kaj Rusio, tri landoj de la Suda Hemisfero: Argentino, Nov-Zelando kaj Aŭstralio plus Ĉinio, Japanio, Kanado kaj Usono. La distancoj varias inter 42 kaj 90 km kaj la tereno varias inter facila kaj malfacila (tio signifas multajn supren-malsuprenirojn). La nombro da partoprenantoj de la konkursoj varias inter kelcent kaj 15'000; tiun lastan nombron atingas la sveda Vasaloppet kaj la norvega Birkebeinerrennet.

La plej interesa afero, kiu altiras homojn al Worldloppet, estas la titolo Worldloppet Master (Majstro). La skiantoj havas specialan pasporton de Worldloppet, kiu entenas unu paĝon por ĉiu konkurso. Post la plenumo de la konkurso la skianto ricevas stampon sur la koncernan paĝon de la pasporto. Farinte dek konkursojn, el kiuj almenaŭ unu devas okazi en alia kontinento, oni sendas la pasporton al la centra oficejo, kiu post la kontrolo de la rezultoj enmetas la skianton en la liston de Worldloppet-Majstro kaj sendas al li/ŝi diplomon. Tiuj diplomoj iĝis prestiĝaj. Ĝis septembro 2016 3846 homoj ricevis almenaŭ unu titolon de Worldloppet-Majstro. Sed iom post iom homoj komencis kolekti Worldloppet Majstro- titolojn kaj ĝis hodiaŭ Worldloppet atribuis 4346 titolojn



Italio. 10 km post la starto de Marciallonga

nijaj pasioj

de Mastro. Mi estis inter la unuaj entuziasmuloj kaj mi estas nun 29-obla Worldloppet-Majstro, la plej titolita Worldloppet-skianto en la mondo. Mi neniam pensis pri la rekordo, sed mi ŝatas partopreni tiujn konkursojn kaj renkonti bonajn homojn el multaj landoj. Kiam pli kaj pli da homoj petis esti fotitaj kun mi, tio ĝenis min. Ĉar fari tiujn konkursojn ne estas granda sporta atingo, sed la vojaĝoj postulas monon. Mia kariero de inĝeniero donis al mi bonan pension, kiun multaj aliaj pli fortaj ol mi skikurantoj ne havas.

La ĉefa (plej longa) skikuradkonkurso en ĉiu Worldloppet-loko validas por la tiel nomata Ora Majstro. Sed ĉie estas organizata ankaŭ duondistanca konkurso, longa 21-45 km, kiu validas por la titolo Arĝenta Majstro. De du jaroj mi faras precipe la arĝentajn konkursojn, kvankam mi ankoraŭ kapablus fari la longajn. Ĉi-jare mi skiis verŝajne mian lastan longan konkurson, tio estis la 70-kilometra Marcialonga en Italio. La duona distanco permesas al mi vere ĝui skiadon kaj admiri la pejzaĝon. La ricevinto de la titolo Worldloppet-Majstro rajtas aĉeti belan medalon, oran aŭ arĝentan.



Norvegio

Dum 40 jaroj de la skikurado en Worldloppet mi spertis multajn aventurojn. En la jaro 2011 aperis mia libro «Skikurado ĉirkaŭ la mondo» en la angla. En ĝi mi rakontis pri Worldloppet kaj kelkaj aliaj popularaj skikuradkonkursoj, kaj kompreneble pri miaj spertoj. Ĉi-sube mi prezentas kelkajn anekdotojn.

Iam en la 80-aj jaroj mi partoprenis la skikuradkonkurson Lavazloppet, «arĝentan» konkurson, orga-


nizitan proksime de la montkolo Lavazè tri tagojn antaŭ la itala Worldloppet-konkurso Marcialonga. Kiam mi startigis mian aŭton post la konkurso por reveni valen, rusoj petis min veturigi du rusinojn al ilia hotelo, kiu troviĝis survoje al mia hotelo en Cavalese. Dum la veturado unu el la virinoj multe babilis. Ŝi montris sian Worldloppet-pasporton, pri kiu ŝi tre fieris. Ŝi admiris la fakton, ke la Worldloppet-pasporto permesas partopreni skikuradkonkursojn en multaj landoj sen vizo (male, la normala pasporto postulas vizojn pri kiuj oni devas multe klopodi). Dua anekdoto pri Worldloppet-pasportoj: iam komence de la 90-aj jaroj mia frato venis de Finnlando por partopreni la francan Worldloppet-konkurson La Transjurassienne. Mi atendis lin ĉe la elirejo de la flughaveno de Genevo. La pordo al la polica kontrolo estis malfermita kaj mi vidis la eliron de vojaĝintoj. Post momento mi vidis mian fraton, kiu donis sian pasporton al la policisto. La kontrolo daŭris longe, sed mi baldaŭ komprenis, kio okazis: li estis doninta sian Worldloppet-pasporton anstataŭ sian finnan pasporton. La policisto foliumis ĝin kaj subite mia frato konsciiĝis pri sia eraro kaj donis sian finnan pasporton. La policisto tute ne estis ofendita, sed petis de mia frato informojn pri Worldloppet, kiujn li volonte donis.

La skikurado estas multe malpli danĝera ol alpa skiado. Tamen, ankaŭ en la skikura-

do povas okazi akcidentoj. Mi neniam falas, kiam mi skikuradas sola. Sed la konkursoj kun miloj da partoprenantoj estas alia afero. Okazis en iu Marcialonga, ke viro falis dum la malsupreniro kelkajn metrojn antaŭ mi. Mi ne havis alian solvon ol eliri el la bone preparita skivojo. La neĝo estis tre profunda, kompreneble mi falis kaj dum momento mi tute malaperis. Feliĉe mi ne suferis, nek la skioj. Mi stariĝis, forskuis la neĝon kaj revenis sur la skivojon. Tie la kompatindulo sakris, ĉar lia skifiksilo rompiĝis. Li mem ne estis vundita, do mi lasis lin tie kaj daŭrigis mian konkurson. Nur unu fojon mi falis skiante sola. Tio okazis en la 80-aj jaroj, mi trejnus sur la itinero de Marcialonga. La antaŭan tagon la temperaturo estis alta kaj la neĝo komencis fandiĝi. Sed la sekvan nokton frostis kaj la neĝo iĝis glacio. Dum la malsupreniro, normale tre facila, la spuroj kruciĝis kaj mi komencis perdi la ekvilibron. Por konservi ĝin mi batis la glacion per mia bastono. Eraro: se mi estus falinta, mi havus maksimume iom dolorajn sidvangojn. Sed mi batis mian okulon al la tenilo de la bastono kaj la akuta doloro faligis min. Mi revenis malrapide al la hotelo. Nur vidinte mian vizagon en spegulo mi komprenis la terurkion de la hotelestrino ĉe mia eniro. Mi deziris la trankvilon de mia ĉambro por min flegi kaj ripozi. Sed la hotelestrino volis nepre scii, kio okazis, kaj fine ŝi demandis: «Kion vi diros al via edzino hejme?». Stultega demando. Mi ne volis perdi tempon kaj respondis: «Mi diros, ke mi batalis pro virino kaj venkis». Centprocenta sukceso: ŝi fermis sian faŭkon kaj mi povis fine iri al mia ĉambro. Poste, dum du-tri semajnoj la ĉirkaŭaĵo de mia okulo montris sinsekve preskaŭ ĉiujn kolorojn de la ĉielarko.

Mia edzino Gisèle malamas la vintron, abomenas la malvarmon kaj malŝatas skikuradon. Antaŭ longe ŝi provis skikuradi kaj eĉ sukcesis atingi ŝirmejon en la montaro. Poste ŝi decidis ĉesigi tiun sporton, ĉar ŝi preferas piedirajn ekskursojn somere. Ŝi akompanis min al ĉiuj Worldloppet-konkursoj. Sed tiuj lokoj estas interesaj nur por skikurantoj, do nuntempe ŝi restas hejme, kie ŝi partoprenas multajn agadojn. Preskaŭ ĉiuj miaj kamaradoj de Worldloppet havas edzinon similan al la mia. Unu tia paro el Kanado vizitis la muzeon de la pentristo Munch en Oslo. Ili staris antaŭ la fama pentraĵo «La krio», en kiu virino kun verdeta vizaĝo eligas terurkion el ŝia tordita buŝo. Ili diskutis pri la demando, kio povus tiagrade terurigi la kompatindulinon. Post la momento la edzino diris: «Ŝi ekvidis amason da neĝo».

Mi renkontiĝis kaj amikiĝis kun multaj personoj el multaj landoj. Temas precipe pri skikurantoj, sed inter miaj amikoj estas ankaŭ familioj, kiuj gastigis min. En Hayward (Wisconsin, Usono) mi loĝis plurfoje ĉe Delores kaj Ernie Lein okaze de la Worldloppet-skikuradkonkurso American Birkebeiner. Ŝi estas nepino kaj Ernie filo de norvegaj enmigrintoj. Delores kuiris bongustajn manĝaĵojn. Ernie estis dum pluraj jaroj la ŝerifo de Hayward (1901 loĝantoj, tion oni legas sur la stratŝildo alvenante al la urbeto). En tiu tempo ŝerifoj povis servi nur unu dujaran periodon. Sed post la unua ŝerifado de Ernie la loĝantaro estis tiom kontenta pri li, ke ili trovis solvon: por la sekva periodo ili elektis Delores kiel ŝerifon. Praktike, Delores zorgis nur pri administrataj aferoj kaj Ernie pri la ordo, kiel volontulo. Delores ankaŭ kuiris manĝaĵojn por la malliberuloj de la loka malliberejo. Verŝajne, la malliberuloj de Hayward neniam ĝuis tiel bonan manĝaĵon, kiel dum tiu periodo. Poste la leĝo ŝanĝiĝis kaj ŝerifoj povis esti reelektitaj. Ernie denove kandidatiĝis, estis elektita kaj servis ses pliajn jarojn kiel ŝerifo. Li ĝuis grandan aŭtoritaton. Okazis nur unufoje, ke li devis minaci drinkulon per pafarmilo por povi lin enŝlosi en malliberejon. Alia drinkulo, kiun li devis malliberigi, minacis lin kriante, ke li havas potencajn amikojn, kiuj baldaŭ venos lin liberigi. Ernie respondis trankvile: «Vi havas amikojn, sed mi havas la ŝlosilon». Delores kaj Ernie aĉetis



**Kovrilo de mia libro.
Mi mem en Aŭstrio**

sian domon de norvego. La domo devis esti transportita sur ilian terenon tra Hayward en la distanco de kelkaj kilometroj. Tio sukcesis senprobleme, sen forigi eĉ unu najlon, kaj la domo estis metita sur la antaŭe preparitan truon, kiu iĝis la keletaĝo. Mi demandis, ĉu la transporto de tiu granda (proksimume 10mx10m) domo ne kreis trafikproblemojn. La respondo de Ernie estis: «Mi estis ja ŝerifo!».

La vaksado de la skioj estas arto. En ĉiu domo aŭ hotelo de urboj kaj vilaĝoj, kie oni praktikas skikuradon, estas speciala ĉambro por vaksi. Tie oni renkontas skiantojn kaj babilas. Ofte la unua demando estas; «De kie vi venis?». En la vaksoĉambro de hotelo en Lillehammer, Norvegio, mi observis du japaninojn. Unu el ili komprenis la anglan, kaj ni interparolis. Ili venis de Finnlando, kie ili jam partoprenis 60-kilometran skikuradkonkurson. Iom poste la anglaparolanta diris al mi, ke ŝia amikino studas la finnan lingvon en universitato. Mi diris al tiu kelkajn vortojn finne kaj ŝi respondis en

bona finna lingvo. Mi kredas, ke pro surprizo, mia mentono formis iuspecan ŝtuparon, kiel oni vidas en humuraj desegnofilmoj.

La ideala vetero por skikurado estas suna kun konstanta temperaturo kelkajn gradojn sub nulo. Tio ebligas, ke la vakso, kiu estis taŭga matene restas taŭga dum la tuta tago sen bezono revaksi. Entute mi pasigis ĝis nun pli ol 4000 horojn por skikuradi kaj spertis ofte malbonan veteron. Tio estas pluvo, forta neĝofalo, forta vento aŭ densa nebulo. Se tio okazas dum la tago de trejnado, ne gravas, oni nur restas en la loĝejo kaj trovas iun bonan tempopasigon. Sed ankaŭ en la tago de konkurso la vetero povas esti malbona kaj tiam oni ne rajtas resti en la hotelo, ĉar oni vojaĝis milojn da kilometroj kaj deziras ricevi la altvaloran stampon de la konkurso en sian pasporton. Mi spertis ĉiusepacajn veteraĉojn dum mia skikurada «kariero». En la tago de Marcialonga de la 80-aj jaroj pluvis dum 24 horoj, la antaŭan nokton kaj la tutan tagon de la konkurso. Post la celo oni povis tordi la vestojn kaj eligi kilogramojn da akvo. En la konkurso riveretoj komencis flui de la montaro, formante lagetojn sur la kavoj de la skivojo. Kelkfoje oni devis demandi sin, kiom profunda estas la lageto kaj ĉu oni povos senriske eniri ĝin je plena rapideco sen bremsi. Sed iom post iom la akvoriveretoj transformiĝis en riveretojn de koto, detruante la glitadon. Mi ŝategis tiun konkurson kaj faris mian plej bonan konkurson se oni konsideras la rilatumon inter mia tempo kaj la tempo de la venkinto. Tiun jaron venkis la finno Kinnunen. La sekvan matenon italaj ĵurnaloj skribis pri la kataklismaj kondiĉoj; unu el ili titolis: «Kinnunen pli forta ol koto».

La plej malvarma konkurso, kiun mi spertis, estis iu Finlandiahiito, 75-kilometra Worldloppet-konkurso en Finnlando. La temperaturo estis -25 °C. En tiu tempo mi ne timis la malvarmon; nuntempe post duobla transpontado de la koro mi ne plu eltenas grandan malvarmon. Sed feliĉe mi eskapis ege malvarman konkurson. En la jaro 1987 mi venis el Finnlando por partopreni la svedan 90-kilometran konkurson Vasaloppet. Dum la vojaĝo mi malvarmumis kaj sabaton vespere mi decidis ne iri al la starto la sekvan tagon. Bonega decido, la temperaturo estis -30°C, laŭ iuj raportoj eĉ -35°C en certaj punktoj de la itinero. Anstataŭ vekiĝi je la tria matene por frua matenmanĝo kaj



Aŭstralio. Tri finnoj atingis la celon

bustransporto al la starto mi ripozis kaj iom antaŭ tagmezo mi surmetis dikajn vestojn, kovris mian vizaĝon tiel ke videblis nur la okuloj, kaj iris al la celo de la konkurso. Por la unua kaj ununura fojo de mia vivo mi vidis la alvenon de la venkintoj. El ilia vizaĝkovrilo pendis glacistalaktitoj kaj iliaj elspiroj faris vapornubetojn. Mi ne memoras, kiu venkis, sed la sesa estis la finna giganto Juha Mieto. Tio estis dek jarojn post la fino de lia kariero kiel granda ĉampiono de skikurado. Li estis tre populara ankaŭ en Svedio. Ĵurnalisto demandis lin : «Juha, ĉu vi opinias, ke pro tiu terura malvarmo oni devis nuligi Vasaloppet ?». Tipa rebato de Mieto: «Nuligi Vasaloppet ? Kial ? Ĉu skikurado ne estas la vintra sporto?».

Mi planas daŭrigi miajn vojaĝojn al skikuradkonkursoj ankoraŭ kelkajn jarojn. Unu evento, kiu ne apartenas al Worldloppet tre interesas min. Temas ne pri konkurso, sed ekskurso (trek en la angla) nomita Rajalta Rajalle (De landlimo al landlimo); unusemajna 440-kilometra ekskurso tra Finnlando de la rusa ĝis la sveda landlimoj. Ĝi okazas en marto; la etapoj longas 44-78 km. La valizoj estas transportataj per buso kaj tagmeze oni haltas por tagmanĝi. Multaj eksterlandanoj jam entuziasme parolis al mi pri tiu ekskurso, sed mi, finnodevena eŭropano, neniam partoprenis, kaj tio estas granda, nepre ŝtopenda truo en mia skikuradkariero.

Legu en la sekva numero de nia gazeto:

- ◆ pri la elstara operkantistino Solomia Krušelnicka, kiun la tri nacioj – ukrainoj, poloj kaj italoj – konsideras sia;
- ◆ pri heroa batalo de kijivaj studentoj kaj gimnazianoj kontraŭ bolŝevika armeo la 29-an de januaro 1918 apud la fervoja stacio Kruti;
- ◆ pri neceso kontroli la prezentatajn faktojn kaj nomojn en la historiaj studoj.

**Transsendu nian gazeton
al viaj konatoj kaj geamikoj enlande kaj eksterlande!**



Mendu librojn kaj gazetojn

„Ukraina Stelo“, p.k. 26, Lucko-18, UA-43018, Ukrainio
ĉe Niko Voloŝin laŭ la retadreso: niko_helianto@yahoo.com